ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK

704.506 A

ESP

Österreichische
Nationalbibliothek
Digitale Services

ÖNB
+Z100228501

M. ŜEJNMAN

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK
704506-B

# Nuntempa socialdemokratio religio kaj ateismo

EKRELO
LEIPZIG 1932

161/34

M. Ŝejnman

# Nuntempa socialdemokratio religio kaj ateismo

EKRELO 1932 LEIPZIG

704. 506-A. Esp.

Tradukis L. Kapustin
Lingve kontrolis N. Incertov

ÖSTERR. NATIONALBIBLIOTHEK WIEN

## DE LA AŬTORO

La verkaĵo ne celas ĉiuflanke klarigi rilatojn de partioj, konsistigantaj II-an Internacion, al eklezio kaj religio. Ĉi tie estas tuŝitaj nur du problemoj de la granda temo: estas observita rilato de social-demokratio al religio per sperto de papa «krucmilitiro» kaj per sperto de partopreno (kaj en apartaj landoj eĉ de gvidado) de social-demokratoj en internacia ateista movado.

XI-a plenkunsido de Kominterna Ekzekutivo karakterizis nuntempan social-demokration, kiel «ĉefan socian apogilon de la burĝa diktaturo». Ĉiam pli kaj pli ĉi tiu sociapogilo de burĝa regado ligiĝas kun alia apogilo de klasa burĝregado — la eklezio. Profunda idea degenerado de la social-demokratio trovis sian respeguliĝon ankaŭ en ĝia rilato al religio. La social-demokratio fariĝis efektiviganto de klerikala reakcio. Senmaskigi la II-an Internacion tiudirekte estas gravege kaj necese, ĉar «senvualigo de social-demokratio, senvualigo de la II Internacio, liberigo de laboristaj amasoj el sub influo de social-demokratio — estas vica tasko de la komunistaj partioj, ne solvinte kiun, al la proletaro ne estas eble sukcese batali por sia liberiĝo de kapitalismaj ĉenoj». (Tezoj de XI plenkunsido de EKKI).

Kiel fundamento de la libro estis metitaj du miaj referatoj: 1) «II-a Internacio kaj la «krucmilitiro», farita en kontraŭreligia sekcio de Komunista Akademio kaj, 2) «Social-demokratio en internacia ateisma movado», farita en kontraŭreligia sekcio de plenkunsido de Unuiĝo de Militantaj materialistoj-dialektikuloj.

Aŭtoro

## Dua Internacio kaj «kruemilitiro» de la papo roma

La «Krucmilitiron» kontraŭ Sovet-Union necesas konsideri kiel unu el rimedoj de la imperialistoj en la prepar-plano de milito kontraŭ USSR. La militiro de ekleziularo havis senperan celon agiti socian opinion de Eŭropo kaj Ameriko kontraŭ Sovetunio. Eĉ parto de burĝa gazetaro estis devigita agnoski, ke «la krucmilitiro» havis ne religiajn, sed pure politikajn celojn—preparon de milito kontraŭ USSR. Fundamenta metodo, per kiu agis niaj malamikoj estas vasta kalumnia kampanio, — kampanio de mensogo, kiu estis pentranta situacion USSR en plej malvera aspekto. Fabelo pri «persekutado» de kredantoj kaj pastraro, pri «persekutoj» pro konfesado, unu pli fantazia ol la alia, trovis por si vastan disfamiĝon kiel sur paĝoj de burĝa gazetaro, tiel en parolado en preĝejoj, dum kontraŭsovetaj mitingoj, en parlamentoj.

Ĉiuj reakciaj fortoj de malnova mondo estis mobilizitaj por partopreni la kontraŭsovetian kampanion. La pozicio de la II Internacio kaj de ties sekcioj rilate al la «krucmilitiro» ankoraŭfoje atestis ĝustecon de la taksado, donita en la programo de Komintern al social-demokratio kiel tre granda «kontraŭrevolucia forto», kiel, «rezervo de burĝa socio, ĝia plej fidinda citadelo».

## II Internacio kaj ties rilatoj al USSR

La proceso de menŝevikoj en Moskvo ankoraŭfoje senmaskigis II-an Internacion kiel ofensivilon, kiel unu el aktivaj organizantoj de militiro kontraŭ USSR.

Rilate al USSR social-demokrataj gvidantoj ofte okupas pli malamikecan pozicion ol multaj reprezentantoj de burĝaj partioj. Jam ekde unuaj tagoj de Oktobra revolucio la

II Internacio kaj ĝiaj gvidantoj okupis certe malamikecan pozicion kontraŭ Sovetlando. Malamikecan politikon kontraŭ USSR ili konsekvence daŭrigas ĝis nun. Forestas iu kampanio instigita de internacia kapitalo kontraŭ USSR, kiun ne aliĝus la social-demokratio. Ĝi senparole ekaprobis ĉinajn generalojn kaj kapitalistojn dum konflikto sur Orientlinia fervojo. Kiam papo elpaŝis kun sia «krucmilitiro» la social-demokratoj lin subtenis. Kiam en 1930 j. en landoj de Okcidenta Eŭropo kaj Ameriko leviĝis kampanio kontraŭ soveta eksporto (kampanio pasis sub devizo — «Kontraŭ soveta dumpingo»), partioj de la II-a Internacio pli furioze ol imperialistoj atakis USSR, kaŝante ofte sian malamikecon kontraŭ Sovetunio sub hipokritaj frazoj pri «defendo da laboristoj» kies interesoj kvazaŭ suferas pro soveta eksporto. Ekzemple: en februaro de la j. 1930, en la belgia parlamento socialistoj postulis malpermeson por importo en Belgion de soveta lino kaj alumetoj. Parolinta socialisto Goen deklaris, ke rapida kresko de soveta ekonomio devas maltrankviligi kapitalistojn de Eŭropo. Ĉi «socialisto» estis konvinkinta kapitalistojn pri tio, ke la soveta kvinjarplano estas danĝera por burĝaro, kaj li finis per jenaj vortoj: «Niaj entreprenistoj devas unuiĝi kaj reciproke helpi unu al la alia en batalo kontraŭ soveta minaco». Ĉi tiu lakeaĵo antaŭ la burĝaro elvokis ironian replikon de katoliko Baels: (ministro de agrikulturo): «Vi mem tiom ŝanĝiĝis, ke fariĝis karikaturo pri la socialismo. Vi delonge perdis vian marksismon kaj prezentas vin bonaj burĝoj».

Bestfurioze malamas Sovetunion la gvidantoj de flavaj usonaj sindikatoj — Grin, Wall kaj aliaj. Ja ili kondukas en Ameriko aktivan kampanion kontraŭ juragnosko de Sovet-Unio flanke de amerika registaro.

Kiam en kapitalismaj landoj sklavposedantoj komencis hipokritecan kampanion kontraŭ «sklavlaboro» en USSR, la social-demokrataj funkciuloj, gazetaro, politikistoj rapide ekhelpis la kampanion. Gazetaro de la II-a Internacio dum proceso de la «Industripartio» elpaŝis defendante

la detrimentistojn. La malamikeco kontraŭ USSR atingis tion, ke CK de la germania social-demokratia partio en Junio de la 1930 j. publikigis decidon, kiu malpermesas al la partianoj esti membroj en «Asocio de amikoj de USSR» kaj en aprilo de 1931 j. CK de la Aŭstria s-d-ia partio malpermesis al siaj partianoj partopreni laboristdelegaciojn, veturantajn en USSR. Estas konataj eksterordinaraj laŭ sia malamo al Sovetunio skribaĵoj de teoriulo de II-a Internacio Karl Kautski, kiu estas unu el ideologoj de kontraŭsovetia fronto en la II Internacio.

Per kio oni povas klarigi, ke partioj, nomantaj sin «socialistaj», kaj «laboristaj», ĉasas Sovetlandon, elpaŝas por ofensivo de imperialistoj kontraŭ unua en la mondo ŝtato, kie la laborista klaso regas kaj konstruas la socialismon?

Tio ĉi estas klarigebla unuavice per tio, ke la partioj de la II-a Internacio estas nek laboristaj nek socialistaj, kvankam en iliaj vicoj ankoraŭ estas nemalmultaj laboristoj, sed la partioj mem estas ĉefa apogilo de l'imperialismo inter laboristaro... rezervo de burĝa socio, ĝia plej fidinda citadelo» («Programo de Kominterrn»). Gvidkontingentoj, teoriuloj, gvidantaro de la II Internacio dum daŭra jarvico konvinkas laboristojn, ke ne necesas la klasa batalo, ke oni bezonas neniajn revoluciojn, ke nur pacvoje, konsentvoje kun la kapitalo, laboristaro alvenos al la socialismo. Samtempe social-demokrata gvidantaro timigis laboristojn, ke proleta revolucio ĝiskondukos al «anarkio», al mastruma disfalo ktp.

Utiligante malfacilan staton de Sovetlando dum jaroj de civilmilito kaj poste de malsatado (en 1921 j.), gvidantoj de social- demokrataj partioj timigis laboristojn sialandajn, agitante ilin: se vi sekvos ekzemplon de Sovet-Rusia laboristaro, vin atendos ekonomi-disfalo. Sed la grakado de kapitalistoj kaj social-faŝistoj pri fiasko de «bolŝevika eksperimento» ne efektiviĝis. La Sovetlando ne nur elrampis el ekonomia malordo, sed sukcese efektivigas la grandegajn planojn de industriigo kaj agrokolektivigo... Unio

de la Sovetaj Socialistaj Respublikoj estas la sola en mondo ŝtato, kie rapide plivastiĝas la industrio, kie progresas agrokulturo, kie pliboniĝas materiala nivelo de laboristaro en urbo kaj vilaĝo, kie estas likvidata sur bazo de kompleta agrokolektivigado la kulakaro kiel klaso, kie forestas senlaboreco. Dum sama tempo en tiaj landoj kiel Germanio aŭ Anglio, kie social-demokratoj partoprenas registaron, same kiel en ceteraj kapitalistaj landoj profundiĝas ekonomia krizo, kreskas senlaboreco, plimalboniĝas materia stato de laboristaro.

Ju pli daŭre, des pli multaj amasoj de laborularo en landoj de Eŭropo kaj Ameriko kaj en kolonioj komencas kompreni, al kio kondukas «paco kun kapitalistoj»; la amasoj konvinkiĝas, ke la sola vojo fini senlaborecon, klasan subpremon por ĉiam estas la vojo de laboristoj en Rusio, kiuj forĵetis en Oktobro 1917 potencon de burĝaro kaj prenis regpotencon en siajn manojn por konstrui la socialisman socion. Ĉiam pli kaj pli kreskas amo al USSR flanke de laborularo kaj subpremitoj de kapitalo en tuta mondo.

Samtempe kreskas malamo al Sovetunio flanke de kapitalistoj ĉiulandaj kaj ties lakeoj — popoj, faŝistoj, social-faŝistoj kaj aliaj.

Instruoj de venkoplena socialisma konstruado en USSR subfosas influon de social-demokratio inter laborista klaso kaj plifortikigas influon de kompartio. Tial social-demokrata supra tavolo malamas Sovet-Union kaj aktive partoprenas ĉiujn kontraŭsovetiajn komplotojn.

Sur ĉi tiu areno gvidantoj de II-a Internacio kontaktiĝis kun papo roma, kun blankuloj, kun la «industripartio», kun faŝistoj kaj kun ĉiu alia fibranĉo de la kapitalismo. La papo roma agitas kontraŭ la kvinjarplano kaj kontraŭ la kolektivigado kaj por defendo de kulakaro. Menŝevikoj elpaŝas ankaŭ kontraŭ la kvinjarplano, kontraŭ la kolektivigado, por redono de la fabrikoj al eksmastroj, por starigo de ĝenerala diktaturo en Sovetlando.

Menŝevikino Olga Domaŝevskaja en «Socialista Heroldo» de la I-a de aŭgusto 1929 profetis: «Oni povas tute kategorie konkludi, ke la kvinjarplano tutece kiel la plano de la tuta ekonomio ne estos efektivigata, ĉar ĝi estas bazita sur ignorado de ekonomiaj eblecoj de la lando kaj spitas al ĝiaj evolutendencoj. Nur per senbridigita fantazio oni povas klarigi la kalkulon, laŭ kiu en kvinjarplano 40% da vargreno estas liverataj de kolĥozoj kaj sovĥozoj...» La menŝevikaj profetaĵoj, kiel ĉiuj scias, brile fiaskis. Sed la menŝevikoj mem, vidantaj kiel realiĝas la kvinjarplano, faris ĉion eblan por malhelpi ĝian plenumon.

Atentante ĉiam kreskantajn simpatiojn flanke de kapitalistlanda laboristaro al USSR, la gvidantoj de la II-a Internacio estas devigitaj iufoje diri pri USSR ankaŭ veron, estas devigataj agnoski sukcesojn de Sovetlando. Vandervelde, gvidanto de la belgia socialista partio en decembro 1930 en la belga parlamento agnoskis, ke USSR nuntempe efektivigas intensan ekonomikonstruadon. «Mia lasta ĉeesto en Moskvo tre impresis min. Mi aludas grandiozajn kreecpenojn de la sovetoj, konstruadon de loĝejoj kaj grenfabrikojn, aranĝatajn laŭ plej moderna tekniko. Do tiuj, kiuj asertas, ke la kvinjarplano fiaskis, estu singardemaj, se ili deziras eviti malagrablaĵojn.» Agnosko de la sukceso de la socialisma konstruado en USSR, ne malhelpas al la sama Vandervelde batali kontraŭ Sovetio, partopreni kontraŭsovetian politikon de imperialistoj, inspiri kontraŭsovetan laboron de l' II-a Internacio.

Plenumante rolon de kapitalismo-savanto la II Internacio kaj ties gvidantoj, nature malamas Sovetion, ili timas sukcesojn de la socialisma konstruado, timas revoluciigan influon de USSR al laboristaj amasoj de iliaj landoj kaj al popoloj de koloniaj landoj.

En batalo kontraŭ Sovetlando partioj de la II Internacio aplikas tiujn samajn metodojn, tiujn samajn rimedojn, kiujn aplikas la burĝaro. Kiel unu el rimedoj de kontraŭsoveta militpreparo kapitalistoj elektis la religion.

Gvidantaro de la social-demokratio ankaŭ vaste utiligas religion por kontraŭsoveta militpreparo. Tio ĉi precipe klare evidentiĝis dum «krucmilitiro» de ekleziuloj, gvidataj de papo roma.

Tial ni transiru al sintenesplorado de la partioj el la II Internacio rilate al la «krucmilitiro».

Por ĉiuj ne estas sekreto, ke «krucmilitiro» celis militpreparon kontraŭ USSR, pri tiu ĉefa kaj baza celo de la «krucmilitiro» ne malofte skribis ĝiaj iniciatintoj kaj inspirantoj mem.

Do kian rolon prenis por si II Internacio? Ĝi prenis jenajn taskojn:

1) Kaŝi efektivajn politikajn celojn de la «krucmilitiro», pruvi, ke la militiro havas nenion komunan kun kontraŭsovetaj artifikoj de la imperialistoj.

2) Montri ĝin kiel moralan movadon de protesto kontraŭ «bolŝevikaj kruelaĵoj» kaj per tio helpi entiradon de pli grandaj amasoj en kontraŭsovetian kampanion.

3) Konvinkigi laboristajn amasojn, ke en USSR efektive ekzistas religiaj persekutoj kaj ke bolŝevikoj ne rajtas protesti kontraŭ «krucmilitiroj», ankaŭ ke laboristoj de Eŭropo ne devas defendi USSR.

4) Konsiderante sin gardanto de la demokratio, partioj de la II-a Internacio postulis al si iniciatrajton en kontraŭsoveta kampanio. Ĉi tiun pozicion de la II Internacio en «krucmilitiro» ni esploros per ekzemploj de ĝiaj apartaj sekcioj.

En kolerega hurlado, adresita al Soveta lando, la internacia menŝevismo ofte pasis antaŭ la pastraro, estante utila por burĝaro precipe pro penetro de sia kontraŭsoveta agitado en laboristajn amasojn.

## Germana Social-Demokrata partio kaj «krucmilitiro»

La germana social-demokratio estas partio en la II Internacio. Ĝiaj gvidantoj delonge sin glorigis kiel malamikoj de USSR. Ilia organo «Vorwärts» estas konata kiel klo-

ako, en kiun oni kunĵetas ĉiujn abomenaĵojn, ĉiujn mensogfabelojn adresitajn kontraŭ USSR, «Vorwärts» tuj aliĝis al «krucmilitiro».

La social-demokratio iom originale eniĝis en la «krucmilitiron» de ekleziularo: devizon—defendu religion de bolŝevika barbarismo», ĝi ĵetis dum procedo de la kampanio; en komenco mem ĝi ekigis ordinaran kontraŭsovetian kurĉasadon ĝuste en tiaj tagoj, kiam papo kaj burĝa gazetaro kaj ekleziaj organizaĵoj furiozis pri «persekutoj kontraŭ religio». Samtempe en februaro de 1930 j. «Vorwärts» instigis provokan kampanion deklarante, ke soveta ambasadorejo en Germanio subvencias komunistan gazeton, la organon de CK de KPG «Rote Fahne». Vorwärts postulis de germana registaro revizii ekzistantajn kontraktojn kun USSR, pruvante ilian malprofitecon por Germanio. Per tia partopreno en «krucmilitiro» «Vorwärts» ne limigis sin: ĝi elpaŝis kontraŭ USSR kun la samaj devizoj, kun kiuj estis elpaŝantaj papo kaj ekleziuloj.

La 14-a marton 1930 la gazetaro enpresis la ĉefartikolon verkitan de rusa menŝeviko Harvi, famekonata pro sia malamikeco al USSR kaj titolitan «Duelo inter Moskvo kaj Romo». La artikolo estas dediĉita al la «Krucmilitiro». La «krucmilitiron» Harvi nomas «duelo inter Moskvo kaj Romo, inter la III Internacio kaj katolika eklezio». Fundamenta tasko de Harvi estas kaŝi politikajn celojn de la «krucmilitiro». Tial li certigas, ke ĉiokaze ni trovas «moralan krucmilitiron». Sed se temas pri «morala» movado, do «la bolŝevismo havas nenian moralan rajton malakcepti la papan proteston kontraŭ alreligia teroro»... Por plifortikigi poziciojn de la malamikoj de USSR, Harvi detale kaj mensoge rakontadas pri «teroro» kontraŭ religio, per tio pravigante «moralan proteston» de papo. Ĉar en soveta gazetaro aperis multaj artikoloj kaj broŝuroj senmaskigantaj sangan estinton de la paparo, tial la menŝeviko Harvi opinias sia devo elpaŝi por defendo de Pij XI, kiun li pentras kiel batalanton por libereco de la konscienco. La papa inkvizicio, diras

Harvi, estas afero de malproksima pasinto, kaj tial malnecesas pri tio rememori. Praviginte la papon, pentrinte lian «krucmilitiron» kiel «moralan movadon» de protesto kontraŭ la «teroro», kalumniinte USSR kaj kompartion, Harvi, tamen asertas, ke la social-demokratio en tiu problemo havas malsamopiniojn kun la papo. La malsamopinioj estas jenkarakteraj: kiu pli rajtas esti gvidanto de kontraŭsovetia militiro de la pastraro? Jen kion skribis Harvi: «La iniciato de la protestmovado kontraŭ nova mezepoko en Oriento apartenas pli ĝuste al la internacia socialismo, ol al la katolikismo»... «Necesas montri al amasoj, — diras Harvi,— ke la socialistoj (el la II Internacio — M.Ŝ.) havas nenion komunan kun teroro kaj persekutado kontraŭ religio». «La social-demokratio — finas Harvi sian artikolon — devas alvoki amasojn sub siajn standardojn por batali kontraŭ la bolŝevismo».

Kiel oni vidas, laŭesence malsamopinioj inter menŝevikoj el «Vorwärts» kaj la papo forestas, ekzistas nur timo, ke la i n i c i a t o n kaj gvidadon de la kontraŭsoveta kampanio prenos en siajn manojn aliaj, t. e. ekleziuloj.

Prezentante sin defendantoj de «libereco de konscienco» la germanaj social-demokratoj kontestis ĉe papo ĉefrolojn en la kalumniado kontraŭ Sovet-Unio.

## Angla laborista partio kaj «krucmilitiro»

La Angla laborista partio ĝuste antaŭ la «krucmilitiro» estis reganta partio. Tial precipan intereson havas observado de tio, kiel sin tenis ĉi partio kaj la laborista registaro al la «krucmilitiro». Same, kiel en la germana social-demokratio, gvidantoj de la angla laborista partio eĉ ne pensis forbati atakojn de konservativuloj kontraŭ USSR. «Laboristaj» ministroj kiel papagoj ripetadis post la konservativuloj fabelojn pri persekutado de religio. Kiam komenciĝis la krucmilitiro, la ĉefsekretario de la laborista partio publikigis en gazetaro la leteron de Makdonald. Makdonald en

sia letero deklaris, ke la angla registaro «estas multe maltrankviligita» pro «persekutoj» kontraŭ religio en USSR. Li diras poste pri tio, ke «la revolucia pensado estas karakterizata per penslimigiteco kaj perforteco, aplikataj por sovaĝa kaj sangavida venkado de realaj kaj imagataj malhelpaĵoj».

Eĉ malgrandan penon apartigi sin de la konservativula kaj ekleziulara «krucmilitiro» gvidantoj de la laborista partio ne faris. Makdonald konsentas ilin, sed li ne volas interveni la aferon, kaj ne volas elpaŝi diplomatie kontraŭ Sovet-Union, ĉar li antaŭtimas, ke interveno de Anglio ne akcelu «plifortiĝon de tiuj turmentoj pro kiuj kristanoj en Rusio eble, estas devigataj suferi». La ĉefulo de la «laborista registaro» plene solidariĝas kun kontraŭsovetiaj elpaŝoj, sed timas ke diplomatia interveno ne «plimalbonigu situacion de kredantoj en Sovet-Unio».

Ĉi tiu deklaro de unu el plej eminentaj funkciuloj de la II Internacio Makdonald plene akordiĝas kun tio, kion diris konservativuloj kaj ekleziularo.

Kial kutime tiaokaze Makdonald ne perdis okazon iom afekti kaj montri sin kaj sinjorojn konservativulojn kiel «batalantojn por libereco», justeco kaj similajn ecojn.

«Miaj kolegoj (socialistoj), — deklaris Makdonald,— konsideras malhonora persekutadon kontraŭ religio. Ni heredis de niaj antaŭuloj maltoleremon al ĉiuj persekutoj, en ajna mondparto, en ĉiu tempo»...

Bele estas dirite, sed en fanfaronado forgesis Makdonald pri religiaj kaj naciaj persekutadoj, aranĝataj de Anglia registaro en Hindio, Palestino, kaj en aliaj ĝiaj kolonioj kaj duonkolonioj.

Do, dume, ĉiu bulvarda, faŝista, pastraĉa gazetaro ĝemkriegis pri «perfortoj» al kredantoj en USSR kaj vokadis al armilbatalo, Makdonald, ĉefulo de la «laborista registaro» nenion trovis pli bonan ol certigi la fabelojn de konservativuloj kaj ekleziuloj. Konklude Makdonald skribas eĉ pri turmentoj «kiujn kristanoj en Rusio eble estas devigitaj

suferi»... Estas kompreneble, ke simila deklaro povis nur verŝi oleon en fajron.

Ankoraŭ pli skandaleca estis sinteno de ministro por eksteraj aferoj Henderson, ankaŭ unu el eminentaj funkciuloj de la II Internacio.

Kiam la 13 de februaro en la parlamento la konservativuloj demandis lin kiel ministron por eksteraj aferoj pri «persekutoj kontraŭ religio» en USSR kaj pri tio, kion li entreprenis por gardi religiajn homojn antaŭ «bolŝevikaj superfortoj», — li respondis:

«Informoj disvastigataj pri la situacio de religio en Rusio, elvokis vastajn resonojn en Anglio kaj en aliaj landoj. La registaro serioze pritraktis ĉi tiujn informojn, tamen mi dubas pri tio, ke proponata de Lokker Lempson (konservativulo kaj malamiko de USSR, — M. Ŝ.) vojo povus konduki al la celo».

«Tamen, — li parolis plue, — la registaro, se estos eble, aŭ konforme kun interesoj de tiuj, kiujn la demando koncernas, estas preta utiligi sian tutan influon kaj helpi aferon de religia libereco kaj senmalhelpa plenumado de religiaj ritoj»...

Ĉi tie mankas iu provo apartigi sin de la kontraŭsoveta kampanio de ekleziuloj, spite tio estas plena solidariĝo kun ili kaj samtempe — rifuzo de aktiva elpaŝo sub la preteksto, ke interveno de Anglio povas nur malutili al kredantoj.

Ankoraŭ pli akrajn kontraŭsovetiajn elpaŝojn permesis al si reprezentanto de la angla «laborista registaro» lordo Parmur en la ĉambro de lordoj. La 21 de februaro 1930, parolante en la lordoĉambro pri kontraŭsovetiaj interpeloj de pastroj, lordo Parmur deklaris, ke la registaro estas preta subteni kontraŭsovetian pozicion de ĉefepiskopoj de Canterbury kaj de Jork.

Ankoraŭ antaŭ tio la 13-an de februaro, tiu sama lordo Parmur deklaris, ke «la «laborista registaro» kategorie kontraŭdiras ajnan formon de persekuto kontraŭ religio kaj

deziras akceli per ajnaj laŭleĝaj rimedoj sanktan aferon de libereco de ĉiuspecaj religioj». Kun tio simile al Makdonald, Parmur menciis sian antaŭtimon, ke la interveno de la angla registaro ne malplibonigu situacion de tiuj, kiujn ĝi volas defendi. Parmur parolaĉis pri «rusaj kruelaĵoj» kaj certigis la malmolfruntajn ulojn, kunsidantajn en lordoĉambro, ke la ministro por la eksteraj aferoj, la «socialisto» Henderson faris ĉion eblan por «moligi la kruelaĵojn» kaj persekutojn kontraŭ religio en USSR. Kiam la 2-an de aprilo en la lordĉambro la popoj denove interpelis pri «persekutoj kontraŭ religio» en USSR, Parmur certigis ĉikanojn de popoj, deklarante, ke «en USSR persekutoj kontraŭ religio atingis tiun teruriĝan amplekson, ke ĉi tiu maŝinigita tiranio daŭris dum kelkaj jaroj». Same kiel Makdonald, Parmur ne forgesis ekfanfaroni per «liberema» politiko de Anglio kaj deklamadis pri devoj de «progresemaj nacioj» (t. e. de sklavposedantoj en Anglio, Francio, Ameriko ktp.) batali por libereco kaj toleremo.

Kio do rezultas? Rezultas la jena bildo: preparantoj de la milito — konservativuloj, naftposedantoj, popoj — kurĉasas Sovet-Union sub preteksto de kvazaŭ ekzistanta en USSR «persekuto kontraŭ religio», sed reprezentantoj de «laborista» kaj apenaŭ ne «socialista» registaro ne nur senprotestas kontraŭ la kurĉasado, sed male, helpas ĝin, jesas al la konservativuloj kaj popoj. Ĉu tio ne estas indiko, de unueca fronto de popoj, kapitalistoj kaj «socialistoj» el la II Internacio kontraŭ la lando de l'Sovetoj? Interalie, la anglaj «laboristpartianoj» tiom dronis en burĝa ideologio, ke sciante pri mensogeco de popaj elpensaĵoj, ili ne kuraĝis ilin refuti, sed konsideris necesa, celante per tio gardi antaŭ bonhonesta burĝaro sian aŭtoritaton, aliĝi al kontraŭsovetiaj artifikoj de ekleziuloj kaj konservativuloj. Ĉar oni ne povas pensi, ke Makdonald kaj liaj ministroj ne komprenis verajn celojn de popoj kaj konservativuloj. Ne. La ministro por internaj aferoj Klajns, parolante la 24 de februaro de 1930 en kunveno ĉe Mertir,

deklaris, ke el informoj pri okazintaĵoj, kiuj laŭ asertoj estas en Rusio «estis farita plej malbona uzo». Alia ministro (milita) Ŝow, en la marto deklaris, ke la kampanio kontraŭ la «religiaj turmentoj» en USSR estas «siaspeca provoko». Kiel Makdonald, tiel ankaŭ Henderson kaj Parmur kaj aliaj reprezentantoj de la registaro en ĉiuj siaj paroladoj menciis, ke informado de burĝa gazetaro pri USSR estas kutime mensoga, ke necesas singardeme rilati al tio, kio estas skribita pri tiu ĉi lando. Spite tio, ili konsideris ebla ripetadi fabelojn de konservativuloj pri «teruraĵoj» en la lando de Sovetoj. Sklaveca humiladorado de «laborist-partiaj» gvidantoj antaŭ la konservativuloj en Anglio estas tiom granda, ke dubante pri tiuj fabeloj, kiuj estas disvastigataj pri USSR, ili aliĝis al la «krucmilitiro» kaj reakcia «Morning Post» la 14 de februaro kontente rimarkigis, ke «ministroj de la reĝa moŝto, ĉu ili tion volas aŭ ne, aliĝis al la protestmovado».

La «laborista registaro» ne havis kuraĝon apartigi sin de kontraŭsoveta kurĉasado. Kial? Tial, ke en Anglio regas la «socialistoj» de lia reĝa moŝto, ke la anglaj «socialistoj» ne estas pli bonaj ol la germanaj, francaj kaj aliaj, ke ĉiuj ili en ĉiu lando servas al sia burĝaro, kaj, kiam anglaj kapitalistoj kaj popoj instigis la kurĉasadon kontraŭ Sovetunio spekulante per fabeloj pri «teruraĵoj» en USSR, ĉu povis tiuokaze la sinjoroj Makdonald, Henderson, Parmur kaj aliaj ekriski kaj rekonsciigi preparantojn de milito? Ili ne nur en la parlamento subtenis kontraŭsovetian kalumniadon de popoj, sed al ili mankis kuraĝeco, por ke estu malpermesita al anglaj soldatoj deviga vizitado de kontraŭsovetiaj preĝadoj.

## Aliaj sekcioj de la II Internacio kaj la «krucmilitiro»

Rilatoj de germanaj kaj anglaj «socialistoj» al la papa «krucmilitiro» estas karakteraj ankaŭ por aliaj partioj de la II Internacio. Dum plej aktiva momento de la papa

kontraŭsovetia kampanio (la 16 de februaro 1930) Vandervelde unu el la gvidantoj el la dua Internacio presigis en la organo de germana social-demokratio «Vorwärts» la artikolojn kontraŭ la «bolŝevika teroro, kontraŭ mortekzekuto, kontraŭ ekstermo de ĉiu libereco, penso, kaj ĉiu ago per fajro kaj glavo». Al la «socialisto» Vandervelde estas maloportune paroli subite ekgalopi, samvoĉe kun papo, tial li en komenco de sia kontraŭsovetia epistolo elpaŝas kiel batalanto por «demokratio» ĝenerale, kaj poste pravigas sin antaŭ Kerenskij, kiu ne laŭmerite kulpigis la II-an Internacion, pro tio, ke ĝi malbone batalas kontraŭ Sovetunio, kaj fin-fine li ekparolis papvorte, deklarante, ke la socialista internacio prenis sub sian protektdefendon ĉiujn viktimojn de «soveta teroro», enkalkulante «pastrajn personojn kaj monaĥojn, kiujn la inkvizicio elinterflanke donas en manojn de soveta potenco». En tono de Vandervelde elpaŝas la centra organo de Holanda social-demokratio «Het Folk». La 24 de marto, kiam la kampanio por «krucmilitiro» atingis kulminan punkton (konekse kun la tagoj de kontraŭsovetiaj preĝadoj), ĉi tiu social-faŝista gazeto elpaŝis kun la kontraŭsoveta artikolo, en kiu ĝi postulis «ĝeneralan potencan proteston kontraŭ politiko de eksperimentantoj kaj ekzekutistoj»...

La social-faŝistoj ne ĉiam malkaŝe alvokis, simile al popoj, «defendi» religion, kvankam ja tion oni ne postulis de ili; kontraŭe, divido de laboro en kontraŭsovetia kampanio postulis, ke popoj elpaŝu kun unuj devizoj, interalie «kontraŭ religiaj persekutoj», kaj social-faŝistoj kun la aliaj—«kontraŭ teroro por demokratio», sed tiuj kaj aliaj faris unu aferon — la aferon, necesan al la internacia imperialismo.

La ĉeĥa social-demokratio (kiel ĉeha, tiel germana) plej hontinde aliĝis al la papa militiro kontraŭ USSR, penante samtempe ĉiurimede nebuligi politikan sencon de la kontraŭsovetia kampanio de ekleziuloj.

Interese estas rimarki, ke la polaj «socialistoj» (PPS) elpaŝis kune kun popoj kontraŭ USSR; Kiam en junio de la j. 1930 en Lvov oni verdiktis morton al tri komsomolanoj pro disvastigo de revolucia literaturo, PPS-a «Robotnik» skribis, ke necesas protesti kontraŭ la verdikto al la komsomolanoj, ĉar la mortekzekuto en Polio malhelpas al Polio protesti kontraŭ religiaj kaj politikaj persekutoj en Sovet-Unio.

En Apudbaltio kaj Polio, same kiel en aliaj eŭropaj ŝtatoj, partioj de la II Internacio ankaŭ malkaŝe elpaŝis kontraŭ USSR kaj aliĝis al papa «krucmilitiro», penante ordinare per sia aŭtoritato de «laboristaj partioj» helpi al la ekleziuloj kaŝi veran celon de «krucmilitiro», pentrante ĝin kiel «moralmovadon de protesto» kontraŭ teroro kaj perfortoj.

En tio ja montriĝis perfida kaj lakea rolo de la II Internacio, preninta je si mision pravigi antaŭ laboristoj ĉiujn krimojn de la kapitalo, aparte ĝiajn krimojn kontraŭ USSR. Harvi, kiel ni jam konigis, en «Vorwärts» provis pruvi, ke la papa militiro estas «morala movado de protesto» kontraŭ bolŝevikaj «kruelaĵoj», ke ĝi havas nenion komunan kun milita komploto de imperialistoj.

Saman linion kondukis ĉiuj aliaj partioj de la II Internacio. Estonia social-faŝista gazeto «Rahva Sena» la 26 de marto 1930 skribis, ke la papa militiro estas klarigebla per «vere humanaj sentoj».. Ĉi tiu pravigo de la «krucmilitiro» per «moralaj» motivoj estis sendube tre utila por la imperialistoj, ĉar ebligis al ili partoprenigi en la kampanio kontraŭ USSR sufiĉe grandajn amasojn, partoprenigi tiujn, kiuj ne cedus al evidentaj (militarismaj) kontraŭsovetiaj devizoj kaj alvokoj.

Kaj ankoraŭ unurilate estas montrinda la pozicio de partioj de la II Internacio. La devizo ĵetita de menŝeviko Harvi pri tio, ke ne al papo, sed al social-demokratio apartenas gvidrolo en la kontraŭsoveta kampanio, por «libereco de konscienco». La devizo trovis resonon en ĉiu social-fa-

ŝista gazetaro. La batalantoj por «demokratio» ne volis ellasi el siaj manoj unu el atutoj de la kontraŭsoveta kurĉasado. Kaj la II Internacio absolute pugnobatalis por iniciata gvidanta rolo en la «krucmilitiro».

Se berlina «Vorwärts» skribis, ke ne al papo, sed al «internacia socialismo pli vere ol al katolikismo, devas aparteni la iniciato de protestmovado kontraŭ nova mezepoko en Oriento» («Vorwärts» la 14 de marto), do viena «Arbeiter Zeitung» (organo de la aŭstria social-demokratio) la 16 de februaro 1930 skribis: «Kiam klerikaluloj, parolante pri Rusio, argumentas per principo de konsciencliberеco, tio estas hipokritaĵo. Sed ni, social-demokratoj, laŭprincipe batalantaj por libereco de konscienco kun la klerikaluloj, devas defendi liberecon de konscienco, batalante kontraŭ nova tendenco de soveta politiko». Tio estas la sama, penso, kiu estis eldirita de «Vorwärts»: ne la papo, sed ni, social-demokratoj, devas ĉefi la kontraŭsovetian militiron de la ekleziuloj.

Ne la papo, sed II Internacio havas pli multe da rajtoj por kurĉasi USSR — jen kia estis sola resono de la socialfaŝismo al «krucmilitiro».

## Rusiaj menŝevikoj kaj «krucmilitiro»

La rusiaj menŝevikoj vivnutratoj de la II Internacio kaj kapitalo en la ne antaŭlonga proceso de «Porsovetia Estraro de menŝevika CK» elmontris sin antaŭ laborista klaso kiel partion de la intervenco, kiel aktivaj agentoj de imperialistoj. Memkompreneble, ke ankaŭ en la kontraŭsovetia kampanio, kia estis la «krucmilitiro», ili vigle partoprenis. En la jam citita antaŭe artikolo de rusa menŝeviko Harvi, presita en «Vorwärts», estis donita programo de la rusia menŝevismo kaj ties rilatoj al la «krucmilitiro». Necesas mencii, ke en batalo kontraŭ la soveta potenco kaj la Oktobra revolucio la rusiaj menŝevikoj ja delonge elektis religion kiel ilon de kontraŭsoveta batalado.

En 1927 en Ĥarkovo okazis la proceso de kartveliaj menŝevikoj. Tiam estis publikigitaj multaj atentindaj dokumentoj—korespondaĵaro inter eksterlanda CK de kartveliaj menŝevikoj en Parizo kaj ties reprezentantoj en Soveta Kartvelio.

Unu el la gvidantoj de kartveliaj menŝevikoj, Noj Ĵordanja, en la letero al sia korespondanto skribis: «Nia celo estas utiligi ĉiujn kontraŭbolŝevikajn elementojn en batalo kontraŭ soveta potenco». Ĉar la eklezio, antaŭ ĉio apartenas al nombro de kontraŭbolŝevikaj fortoj, tial menŝevikoj rapidas ankaŭ ĝin utiligi por siaj kontraŭsovetiaj celoj. Alia partiĉefo de la kartveliaj menŝevikoj, Ramiŝvili, en letero al sia korespondanto petas de li informojn laŭ jenaj demandoj, koncernantaj al Soveta Kartvelio: «Situacio de eklezio. Ĉu daŭras persekutoj kontraŭ eklezio. -Arestoj kaj ekziloj de pastroj (ties familinomoj). Kiom da preĝejoj estas ruinigitaj? Ĉu oni malakcelas aŭ ne diservon? Ĉu ekzistas tiucele impostoj por preĝejoj? Ĉu okazas mokado je dikredantoj? Ĉu oni persekutas aŭ ne armenan kaj mahometanajn ekleziojn?». Kiel oni scias, rusiaj kaj (ankaŭ la kartveliaj tiunombre) menŝevikoj estas «informistoj» de la II Internacio pri situacio en USSR. La demandoj, pri kiuj Ramiŝvili petas respondon de sia korespondanto — ne estas vanaj demandoj: por li estas necesaj «informoj» pri situacio de eklezio en USSR, por instigi la kontraŭsovetian kampanion. Li, Ramiŝvili, plue en sia letero senkaŝe diris pri tio: «Antaŭvidu, ke en Anglio ni havas interligon kun ĉefepiskopo de Canterbury pere de nia konsulo kaj en Romo ni havas ĉe la papo specialan reprezentanton Ivanickij (R. Ingilo). El Kartvelio atingis min famo, ke ĉefuloj de niaj eklezioj pripensas union. Ĉiuokaze... vi devas sendi ĉiujn informojn, koncernantajn eklezion. En Eŭropo tio havas plej gravan signifon.

Atentinda estas konfeso de la kartveliaj menŝevikoj, ke ili estas kunligitaj kun la papo Roma kaj kun ĉefulo de anglia eklezio ĉefepiskopo de Cantarbury. Elserĉante

«faktojn» pri persekutoj kontraŭ religio menŝevikoj komprenas, ke en Eŭropo «tio havas plej gravan signifon».

Tio estis skribita en 1927. Do 3 jarojn antaŭ komenco de la papa «krucmilitiro» la menŝevikoj jam komencis kolekti la materialon por la papo, por burĝa gazetaro, por konservativuloj. Kaj kiam komenciĝis la kontraŭsovetia kampanio de la papo, la rusiaj menŝevikoj ekrapidis aktive partopreni ĝin.

La 25-an de februaro 1930 «Socialista Heroldo» № 4 (218) en la fruntartikolo skribis pri ĉirkaŭkapto de USSR flanke de imperialistaj ŝtatoj. Parolante pri izoligo de Sovet-Unio, la «Socialista Heroldo» skribas: «Minacantan signifon havas la papa epistolo alvokanta al batalo kontraŭ la bolŝevismo atentantajn lian voĉon multmilionajn katolikamasojn de l'tutmondo. Ĉu tio signifas, ke la kapitalistaro «preparas militon» kontraŭ Sovet-Unio, kiel trumpetas tuta bolŝevika gazetaro? Tute ne. Necesas nenion kompreni en nuntempa tutmonda situacio... por kulpigi ĝin (t. e. imperialismon. — M. Ŝ.) hodiaŭ pro militintencoj...»

Tiamaniere la menŝevikoj taskis al si pravigon de la «krucmilitiro», nebuligon de ĝia politika signifo (simile al ili la «krucmilitiron» pravigis aliaj sekcioj de la II Internacio). Krome la menŝevikoj prenis je si rolon de «liverantoj de «fakta materialo» por la kontraŭsoveta kampanio. «Socialista Heroldo» № 5 (219) de 15 septembro 1930 en la artikolo pri la malkulakigo skribas, ke «en vilaĝoj oni mortpafas popojn kaj kulakojn».

En la sama numero la «Socialista Heroldo» aperigis vastan artikolon de Dalin — «Batalo kontraŭ religio», kiu estas programa artikolo, traktanta problemon pri sinteno de la rusia menŝevismo rilate al la papa «krucmilitiro».

Dalin skribis: «Plejmulto de nia partianaro ĉiam estis kaj restas ĝis nun malreligia, fremda al ĉiu religia movado, sed ĝuste pro tio ni konsideras nia devo laŭte kaj decide

protesti kontraŭ tiuj persekutoj, al kiuj nune estas subigataj eklezioj de ĉiuj religioj en Soveta Rusio.

Ĝuste pro tio, ke por ni ĉiu religiemo kaj eklezianeco estas fremdaj, ni alvokas ĉiujn revoluciajn kaj socialistajn elementojn de Rusio kaj Eŭropo, ĉion, kio ekzistas honesta kaj progresema por estu malhonorigita «batalo kontraŭ religio per koncentraciaj arestejoj kaj Solovki»... Kortuŝanta estas la bildo: la roma papo postulas militon kontraŭ USSR kvazaŭ pro tio, ke tie oni «persekutas» religion, kaj sinjoroj «socialistoj» al li helpkantas: «Ni mem ne kredas dion, sed ĝ u s t e p r o t i o (!?) ni alvokas ĉiujn «vivajn fortojn» de Eŭropo kaj Rusio elpaŝi kontraŭ bolŝevikoj pro ilia prireligia politiko».

Pleja flathumiliĝo, pleja lakeemo antaŭ la imperialismo kaj pastraro estas malfacile imagebla! Dalin en sia artikolo ploras pro preĝejlikvido en USSR, pro kreskado de Unio de Militantaj ateistoj.

Li kalumnias kontraŭ Sovetlando pro ekapero de intervjuo de la ortodoksaj ekleziuloj (Sergio k. a.) kiuj protestis kontraŭ antisovetaj elpaŝoj de la papo. «Intervjuo, — skribas Dalin, — estis elpensita en la gvidorganoj. Dalin skribas pri la intervjuo samon, kion skribis burĝa kaj klerika gazetaro. Poste en la artikolo sekvas abomenaj «traktaĵoj kaj klarigoj» de kontraŭreligia politiko de kompartio. Jen kiel prezentas ĝin Dalin: «Laŭ komunista teorio, simile al tio, kiel for de «kulako» (Dalin skribas kulako inter citsignoj — M. Ŝ.) oni deprenas terareon, kaj novburĝo likvidas butikon, tiel same ĉe kredanto oni likvidas religion»...

«Socialisto» Dalin ĉagrenas pri tio, ke en USSR nur dum lasta duonjaro estas likviditaj preĝejoj pli multaj ol dum 7 jaroj antaŭaj. Li detale traktaĉas pri «ekziloj kaj ekzekutoj» de pastroj, insultegas union de ateistoj ĝuste sammaniere, kiel tion faris la papo roma. «Socialisto» Dalin finas sian artikolon per sinkonsolo: li skribas pri observebla en USSR «religikresko» inter laboristaro. So-

cial-demokrato Dalin, kiel la papo, kiel la burĝaro, tre volas, ke inter laborulamasoj de USSR kresku religiemo. La deziraton ili opinias realo, kaj Dalin aklamas: «Inter laboristoj kreskas religiemo kaj por preĝejkonstruado monoferas eĉ almozpetantaj proletoj».

Sinkonsolu la menŝeviko Dalin, gajncelu per «kresko de religiemo». Ja per tiu sama religiemo gajncelas kapitalistoj kaj blankuloj. Ĉu Dalin estas pli malbona ol ili?

Elpaŝo en 1930 j. por defendo de religio, kvazaŭ «persekutata» de bolŝevikoj, ne estas novaĵo por la menŝevikoj kaj ties «Socialista Heroldo». Ili ankaŭ antaŭe ne forlasis okazon instigi kurĉasadon kontraŭ Sovetio, utiligante tiucele religion.

En fino de 1929 j. en Leningrado GPU (Ŝtata Politika Administrejo) malkaŝis la kontraŭrevolucian organizaĵon «Reviviĝo». Tie ĉi sub kovro de religio, plejaj kontraŭrevoluciuloj kondukis kontraŭsovetian laboron, ili estis ligitaj kun eksterlando, ili plektis retojn kontraŭ soveta sociordo. Kiam en gazetaro aperis sciigo pri likvido de tiu ĉi organizo, la menciita menŝeviko Dalin en «Socialista Heroldo» (18 de septembro 1929) en artikolo «Socia mendo» elpaŝas por defendo de religiuloj-kontraŭrevoluciuloj el organizo «Reviviĝo». Jen kion skribis Dalin:

«Alia heroaĵo de peterburga GPU estas likvidado de organizo «Reviviĝo».. Ĉi tiu kontraŭrevolucia organizo estas heredanto de iutempe ekzistinta «Peterburga religi-filozofia asocio». La menŝeviko Dalin konsideras necesa defendŝirmi ĉi tiujn homojn, li nomas la kontraŭrevoluciulojn — «plejlojala parto de la burĝa inteligentularo». Li certe konsideras, ke nur «kruelaĵoj de GPU» kaŭzas likvidon de ĉi organizo.

De menŝevikoj ni transiru al iom alinuanca «socialisto» al babilulo Kerenskij.

Ĉi tiu viro ankaŭ konsideras sin «socialisto». Kvankam formale li ne estas ano de la II Internacio, sed li havas proksimajn rilatojn al ĝi. Dum la «krucmilitiro» francaj

socialistoj akceptis Kerenskij kaj Milukov kaj ebligis al ili iom plendi pri bolŝevikaj «kruelaĵoj» kaj rakonti «teruraĵojn» de la eklezio en Soveta Unio.

Ankoraŭ en decembro de 1929, kiam komenciĝis la kampanio de ekleziuloj kontraŭ USSR, Kerenskij intervjuata de reprezentanto de angla gazeto «Morning Post» deklaris, ke laŭ lia opinio la «Okcidenta eklezio... devas per tuta forto de sia potenco ne nur protesti kontraŭ religiaj persekutoj flanke de soveta potenco, sed ankaŭ kontraŭ senĉesa interveno en aferojn de konscienco de ĉiu aparta homo». La 3-an de marto new-jorka gazeto «New-Jork Iwning Post» publikigis artikolon de Kerenskij, kiu atakis USSR pro ĝia prireligia politiko kaj postulis «moralan intervencon» de burĝaj ŝtatoj kontraŭ USSR.

Papo ankaŭ parolis pri «morala intervenco». La morala intervenco laŭ konsidero de franca generalstabo devas esti finita per milita intervenco, la morala devas esti nur preludo al la milita.

En ĉefartikolo de sia gazeto «Dni» (Tagoj) de la 5 januaro de 1930 j. Kerenskij skribis, ke necesas «eksterpartia spirita unuiĝo de ĉiuj kulturaj francoj je nomo de morala interveno» en aferojn de USSR. Kerenskij ankoraŭ pli disvolvis sian kontraŭsovetian laboron tiumomente, kiam la papoj kaj ekleziuloj de ĉiuj landoj plifortigis kurĉasadon kontraŭ USSR. Ĉio evidentiĝis antaŭkalkulita ĝuste kaj labordivido estis plena. Socialisto-menŝeviko Dalin kaj «socialisto» Kerenskij krias pri «savado de religio», «premata» de bolŝevikoj, kaj ili vokas kapitalistaron al «morala interveno» en aferojn de USSR sammomente, kiam laŭ ordono de franca generalstabo agentoj de la Komerc-Industria Komitato detrimentas interne de USSR, unuiginte kun menŝevikoj, kiam la papo roma alvokas al batalo kontraŭ la bolŝevismo, kaj la imperialistoj furioze preparas la militintervencon!

«Socialisto» Kerenskij, simile al menŝeviko Dalin, ankaŭ konfidas al religio kiel ilo por batali kontraŭ la komunismo

kaj USSR. En la artikolo titolita «Sub signo de kredo» («Dni», Parizo la 12 de aprilo 1929) Kerenskij polemikas kontraŭ la artikolo «Reakcio sub flago de religio», presita en Moskva revuo «Juna Gvardio» (en aprila numero de 1929). Li plendas pro «religiaj persekutoj» en USSR, tiusence eĉ antaŭiras la papon kaj ekleziularon kun ilia «krucmilitiro». Li estas tre ĝoja pro unuecfronto de pastroj, rabenoj kaj baptistaj predikistoj kontraŭ la socialismo. Kerenskij skribas pri tio, ke religio estas «spirfendo» por ĉiuj malkontentuloj de Soveta potenco. Tiurilate li absolute pravas: sub ŝirmo de eklezio serĉas por si rifuĝejon kontraŭrevoluciaj elementoj, utiligantaj religion por kontraŭsoveta agado. Li finas sian artikolon atentigante tion, ke flanke de religio «en kelkio estas malfermitaj novaj eblecoj» — certe eblecoj por kontraŭsoveta agado.

Blanka elmigrintaro ankaŭ opinias sia kunulo la eklezion de USSR, kaj gajncelas per religio, kiel ilo de kontraŭsovet'a agado. «Socialistoj» el la II Internacio ankaŭ en ĉi tiu problemo rigore sekvas plejajn «nigrocentulojn».

Kiuj konkludoj estas laŭ la supredirita?

Kapitalistoj de ĉiuj landoj por batali kontraŭ USSR, vaste utiligis religion. Partioj de la II Internacio, aparte la rusia menŝevismo, ankaŭ vaste utiligis religion por kurĉasado kontraŭ USSR, do — por preparado de milito kontraŭ Sovetlando.

Laŭesence ĉi tie estas unu linio kun imperialistoj, nur kun certa labordivido. Se burĝaro kaj eklezio senkaŝe starigis devizon de batalo kontraŭ USSR por «defendo de religio», kaj sufiĉe sincere oni parolis pri neceso izoligi USSR, fari militiron kontraŭ ĝi, tiam la II Internacio, aliĝinte al kontraŭsoveta ofensivo, prenis je si ankoraŭ unu mision: konvinki laboristamasojn pri tio, ke «krucmilitiro» havas nenion komunan kun la politiko, kaj tiom pli havas nenion komunan kun la politiko de la imperialisma blokado kontraŭ USSR. Per tio la social-faŝistoj «nobligis» la kontraŭsovetian kampanion de ekleziularo,

enkonsciigis al la amasoj konvinkon pri tio, ke oni parolas pri «moralmovado de protesto kontraŭ bolŝevikaj kruelaĵoj», ke nur la komunistoj elpensas, kvazaŭ la «krucmilitiro» estas parto de militpreparo kontraŭ USSR. Per ĉi tia sia politiko la social-demokrataj gvidantoj plifaciligis al ekleziularo entiri en la kontraŭsovetian kampanion amasojn kaj pravigadis sian perfidon kaj kontraŭsovetian politikon antaŭ laboristoj social-demokratoj, simpatiantaj al la socialisma konstruado en USSR. Unuvorte oni povas diri, ke por la social-demokratio en la «krucmilitiro» estis destinita «honora» tasko — la mobilizado de kanonviando por la kontraŭsovetia kampanio, la moralpravigado de militpreparado kontraŭ USSR kaj la malfortigado de tiu tendaro, kiu sub gvido de la kompartioj batalas por defendo de la socialisma konstruado en USSR. Sed ĉar la social-faŝismo konsideras sin sola gardanto de la «demokratio» kaj «batalanto» kontraŭ «teroro» (se la teroro okazas direktita kontraŭ laborista klaso, tiuokaze la social-faŝismo ne protestas), tiam ĝi nature ofendiĝis, vidinte en papa persono la konkuranton. Jen pro kio la socialfaŝismo, solidariĝinte kun la papa kontraŭsovetia politiko, ofensiĝeme postulis por si laŭrojn de iniciato en la kontraŭsovetia kampanio. Pri tio skribis en berlina «Vorwärts» Harvi, oni skribis en viena «Arbeiter Zeitung», en «Socialista Heroldo» Dalin, pri tio estis skribita ankaŭ en aliaj presorganoj de la II Internacio. Ni vidos poste, ke tion saman postulis la social-faŝistoj «ateistoj» (gvidantoj de la Germana Asocio de liberpensuloj) en sia presorgano «Freidenker».

## Social-demokratio el IPL kaj «Krucmilitiro»

Kion do faris tiutempe organizaĵoj de proletaj liberpensuloj en Okcidento? Estas konate, ke responde al la «krucmilitiro» en Germanio pli ol 50 mil homoj foriris el eklezia komunumoj. Laboristoj organizis amasajn demonstraciojn kaj protestmitingojn kontraŭ klerikala kalum-

niado kontraŭ USSR. Aktive partoprenis defendkampanion de USSR proletaj liberpensulaj organizaĵoj de Eŭropo. Tamen multajn el ĉi tiuj organizaĵoj gvidas social-demokratoj. Ili enkondukis kontraŭsovetian politikon de iliaj partioj (supre jam cititan) ankaŭ en tiujn amasajn proletorganizaĵojn, kiujn gvidi ili sukcesis instali siajn homojn, aparte en tiujn, kiuj devus esti iniciatantoj en protestkampanio kontraŭ papa ofensivo, — en la asociojn de proletaj liberpensuloj kaj en unuigantan ilin Internacion de Proletaj Liberpensuloj. (IPL).

Nature estis atendi, ke proletaj liberpensulaj organizaĵoj kaj la unuiganta ilin Internacio (sidejo en Wien) elpaŝos kun akra protesto kontraŭ la papa aventuro, kaj ke ili organizos amasojn por batalo kontraŭ «krucmilitiro» kaj por defendo de USSR, ke ili utiligos la «krucmilitiron» por senmaskigi klasan rolon de religio ĝenerale kaj por varbi al ateismo novajn amasojn. Sed fakte okazis tute alia. Fakte la Internacio de proletaj liberpensuloj okazis postsekvanta la kontraŭsovetian kampanion. La kampanion kontraŭ la papa militiro la Internacio tute ne kondukis kaj per sia pasiva pozicio eĉ helpis al la klerikalismo kaj al la kontraŭsovetiaj konspirantoj. Per kio oni povas klarigi tion, ke multaj organizaĵoj de proletaj liberpensuloj okupis atendeman, kaj ofte eĉ kontraŭsovetian pozicion rilate al la papa ofensivo? — Nur per tio, ke gvidpostenojn en la organizaĵoj okupis social-demokratoj, ankaŭ la Internacion de Proletaj Liberpensuloj — tiutempe gvidis la social-demokratoj — Hartwig, Sievers kaj aliaj.

Plej tutece kaj konsekvence kondukis la social-demokratan politikon gvidantoj de la Germana Asocio de Proletaj Liberpensuloj. Dum maldekstraj grupoj de proletaj ateistoj en Germanio disvastigis grandan agit-kampanion por defendo de USSR, la social-demokratoj, ĉefantaj Germanan Asocion de Liberpensuloj (grandan organizaĵon enkalkulantan 600 milojn da membroj), paŝis en vico kun papo kaj ekleziuloj.

Ni jam diris, ke la social-demokratoj (aparte la germanaj, aŭstriaj kaj rusiaj) serĉis por si laŭrojn de iniciatintoj en la kontraŭsovetia kampanio. Samsence ankaŭ elpaŝis la gvidantoj de la Germana Asocio de Proletliberpensuloj. Dum plej akra momento de la kontraŭsoveta kampanio de la papo en la gazeto de la germanaj proletliberpensuloj «Der Freidenker» (en aprilo de la j. 1930) aperis la artikolo de l'elmigrintino-trockianino Petrova — «Problemoj de religio en USSR». La artikolo sukcese povus esti presita en ajna burĝa organo. Petrova skribis pri «malloga kontraŭreligia agitado en USSR». Ĉar fabeloj pri religiaj persekutoj en tiuj tagoj estis bonvendebla varo, tial la trockianino Petrova ne forlasis la okazon por utiligi ankaŭ ĉi tiujn argumentojn. Ŝi skribis «pri multaj malgrandaj lokaj komisaroj kaj partiaj agentoj kun grandaj revolveroj kaj malgrandaj cerboj», kiuj persekutas religion, kiuj «komencis fermi preĝejojn kaj aranĝi en ili klubojn». La artikolo de trockianino Petrova estis plena da abomenaj atakoj, adresitaj al USSR, al la sovetia kompartio kaj ties gvidantoj. Ŝi finas per vortoj: «Ne papo... rajtas indigni kontraŭ religia teroro de la soveta registaro, sed ni, liberpensuloj»... Pli grandan lakeecon antaŭ eklezio oni ne povas elpensi: organo de «ateistoj» deklaras, ke ne la papo, sed la proletaj liberpensuloj (!) devas protesti kontraŭ «religipersekutoj» en USSR. La social-demokratoj konsekvence kondukis linion de sia partio eĉ en organizaĵoj similaj al tiu de liberpensuloj. Jen kial tie, kie la organizaĵoj troviĝas sub influo de social-faŝista gvidado, tie ili nenian batalon kontraŭ la «krucmilitiro» okazigis. Eĉ pli, en ĉiuj ĉi landoj social-demokrataj gvidantoj eksigis el la liberpensulaj asocioj pro partopreno en la protestkampanio kontraŭ la papa «krucmilitiro» kiel apartajn membrojn, tiel ankaŭ tutajn grupojn.

Ĉar ĉi tiu taktiko de la social-faŝistoj en la organizaĵoj plifortigis maldekstran revolucian alon, tial Sievers, la prezidanto de la germana Asocio en cirkulera letero al la

Liberpensula Asocio en junio de la j. 1930, pravigis sian pozicion tiamaniere: «Oni kelkfoje nin demandis, kial ni al la deklarita de papo «krucmilitiro» kontraŭ Soveta Rusio ne respondis aktive»... Kial do tio okazis? Tial skribis la social-demokrato Sievers, ke «ni al la deklarita de papo batalo kontraŭ Soveta Rusio ne tiel tragedie rigardis, kaj la tuta alarmo, kiu estis poste instigita, estas nenio alia, krom ordinara komunista teatreca reklamo». Kvazaŭas, ke ne la papo elpaŝis kiel instiganto al la kontraŭsoveta milito laŭ ordono de la imperialistoj, sed la komunistoj mem, aranĝis por si «reklamon» el papa elpaŝo.

Se ni ekmemoru, ke la social-demokrataj partioj, kiel tio klariĝis en la proceso de l'menŝevikoj kaj kiel tio estas videbla el ilia pozicio rilate al la socialisma konstruado, partoprenas komploton de imperialistoj kontraŭ USSR, tiuokaze estos kompreneble, kial la social-demokrato Sievers «ne tiel tragedie» rigardas la papan «krucmilitiron».

Kiel ĉefo de la Internacio de la Proletaj Liberpensuloj — tiutempe estis la «maldekstra» social-demokrato Hartwig. Lia situacio estis iom pli komplika, ol tiu de Sievers (gvidanto de la Germana Asocio). Hartwig ja estis la prezidanto de la Internacio, kies membroj estis ankaŭ vere revoluciaj organizaĵoj de ateistoj, en tiu nombro Unio de Militantaj Ateistoj (UMA) de USSR. Tial li ne povis tiel senkaŝe kaj diskrete kiel Sievers, aliĝi al la papa kontraŭsovetia ofensivo. Jen kial Hartwig, ŝajnigante, ke li «protestas» kontraŭ la papa militiro, fakte bremsigis disvolviĝon de la kampanio por defendo de USSR. Ekz. la 4-an de marto 1930 kun subskribo de Hartwig estis de nomo de sekretariaro de Ekzekutivo de Internacio cirkulero «Pri 19-a de marto» (tago de papaj kontraŭsovetiaj preĝadoj). Jen kion skribis Hartwig al ĉiuj sekcioj de la Internacio de Proletaj Liberpensuloj (IPL): «Ĝenerala sekretariaro de IPL faras n e n i u j n  o r d o n o j n, sed nur sugestas kaj proponas sugesti aliajn; ĉi tiuj sugestoj estas bazataj sur agemo de IPL-anoj mem». Tion oni devas kompreni tiel: la Ekzeku-

tivo de IPL nek proponas kaj nek alvokas por batali kontraŭ la «krucmilitiro», sed fidas «memagemon» de la sekcioj. Ni vidis, ke la social-demokratoj en Germanio, Aŭstrio, Ĉekoslovakio, Ameriko kaj en aliaj landoj ĉi tiun «memagemon» komprenis laŭ propra penso kaj aliĝis al la «krucmilitiro». Kio do proponas Hartwig: «Ni, — skribas li en sia cirkulero, — devos evitadi, kontraŭagante al eklezio, akvoverŝadon sur ĝian muelejon. Pro tio estas rekomendata disvolvi nian agemon post la okazintaĵoj.»

Bonega estas konsilo: post kiam la papa kurĉasado disvolviĝos, post kiam la papoj finos, «ni, liberpensuloj, devas komenci — alie ni verŝos akvon sur muelejon de eklezio».

Tiel la «maldekstra» Hartwig batalis kontraŭ la «krucmilitiro».

## Social-demokratio kaj politiko de soveta potenco rilate al kulto

En la «krucmilitiro» la social-demokratio demonstris sian solidarecon kun la klerikalismo kaj montris, ke ĝi ankaŭ scipovas utiligi religion kiel batalilon kontraŭ bolŝevismo. Tia religi-utiligo de la II Internacio por batalo kontraŭ Soveta Unio ne estas novaĵo, ne estas afero nur de «krucmilitiro», — ĝi okazis dum jaroj de la Oktobra revolucio, kaj okazos ankaŭ estonte. Kiel anglaj konservativuloj kaj imperialistoj de aliaj landoj utiligis kaj utiligas religion por siaj kontraŭsovetaj celoj, tiel same utiligas ĝin la II Internacio.

En landoj de Eŭropo kaj Ameriko pro la krizo kaj akriĝo de la klasaj kontraŭdiroj la burĝaro ĉiam pli kaj pli fortikigas poziciojn de l'eklezio por batalo kontraŭ laborista movado, ĉe tio en sia eklezia politiko ĝi renkontas plenan subtenon de la social-demokratiaj partioj. La socialistaj partioj ĉie kunlaboras kun la eklezio. Tio elvokas malkontenton de progresema parto de laboristoj, en ties nombro

de socialistaj laboristoj, kiuj komprenas, ke kunlaboro kun la papo kaj klerikaluloj estas deiro de la marksismo, foriro de proletaj pozicioj.

Kiel do la ĉefoj de socialistaj partioj pravigas sian konkordat-politikon? Dum la «krucmilitiro» ili kriis pri religiaj «persekutoj» en Soveta Rusio. Sed ĝuste dum periodo de sia plej intensa konkordat-politiko (1928—1929) social-demokratia gazetaro komencis skribi pri «alianco» inter la eklezio kaj ŝtato en Soveta Rusio. Dum periodo, kiam la ĉefoj de social-demokratio bezonis antaŭ laboristoj pravigon de sia konkordata politiko, de sia kuniĝo kun popoj, ili tiuokaze komencis kalumnii, disvastigi fabelojn pri «interkonsento» kaj «konkordato» inter soveta registaro kaj la eklezio. Certe mensogeco de similaj elpensaĵoj rapide estas senmaskigata, sed certamomente ĉi tiuj fabeloj faras aferon necesan por socialdemokrataj partioj. Ni menciu la okulfrapajn ekzemplojn tiusencajn.

En fino de la j. 1927 la angla-amerika telegrafagentejo «News-Paper Service» disvastigis falsaĵon — «intervjuo» de k-do Stalin «pri aviadil-fortoj de USSR» pri tio, ke la soveta registaro laboras kune kun la ortodoksa eklezio ktp. La agentejo informis, ke k-do Stalin kvazaŭ deklaris al plifortikigo de defendkapablo de la lando, ke al konstruado de aerŝiparo nin helpas paco, kontraktita kun la «sankta ortodoksa eklezio». La falsan «intervjuon» burĝa gazetaro promenigis tra tuta mondo. Samtempe komunista gazetaro publikigis informon, ke la «intervjuo» de k-do Stalin estis ordinara falsaĵo, kiujn dum lastaj jaroj multokaze verkis koruptema burĝa gazetaro por celoj de kontraŭsovetia politiko de imperialistoj. Interalie, en la mensogema «intervjuo», en la falsaĵo estis dirite, kvazaŭ k-do Stalin diris, ke 95% da loĝantaro en Soveta Rusio konsideras sia idealo la religion, ke li nomas ateistojn «politikaj stultuloj» kaj «krimuloj kontraŭ Soveta afero», ke li kvazaŭ estas laŭdoplena al la «sankta ortodoksa eklezio» kaj konsideras pleja sukceso de la soveta diplomatio, ke la «sankta ortodoksa

eklezio laboras brako ĉe brako kun produktanta gasajn venenojn kaj militajn aeroplanojn ŝtato».

La social-demokratoj kaj ilia gazetaro, simile al la burĝaro kaj ties gazetaro ekrapidis kapti kaj utiligi ĉi tiun falsaĵon. La 11 de decembro de la j. 1927 la viena social-demokrata gazeto «Arbeiter Zeitung» represis ĉi elpensaĵon pri la pseŭda «interkonsento» de l'bolŝevikoj kun la «sankta ortodoksa eklezio» kaj akompanis ĝin per jenaj komentoj: «Jen k-do Stalin agnoskis pravecon de paciĝo kun religio kaj kunlaboron de la bolŝevikoj kun la eklezio, sed ni, social-demokratoj, staras kaj ĉiam staris sur tiu vidpunkto, ke kontraŭ religio batali ne estas necese. «Sed,—rimarkigas la gazeto,—estas nur malfacile kompreni, laŭ kia rajto. eŭropaj komunistaj partioj kulpigas la social-demokration pri perfido, se ili celas al tiu sama religi-politika celo, kiun Stalin konsideras plej granda sukceso de la rusa revolucio...» (Sed pli supre la gazeto informis kvazaŭ laŭ opinio de k-do Stalin, pleja sukceso de nia diplomatio estas tio, ke la «sankta ortodoksa eklezio» laboras mano ĉe mano kun soveta registaro).

Ĉu ne estas klare, ke la falsaĵon de burĝa gazetaro la aŭstriaj social-faŝistoj penis utiligi por siaj parti-politikaj celoj, celante pruvi antaŭ laboristoj sian amikecon rilate al la eklezio per ekzemploj de bolŝevikoj, kvazaŭ tiuj en USSR, post 10 jaroj de revolucio, alvenis al intima kunlaboro kun popoj. Estas rimarkinde, ke la falsaĵon penis utiligi por batalo kontraŭ revolucia alo de ateistoj ankaŭ gvidantoj de la aŭstria asocio de proletaj liberpensuloj (gvidataj de social-demokratoj), kiuj enpresis en sia gazeto «Der Freidenker» (en januara numero de 1928) la falsaĵon.

La 6 de januaro de la j. 1928 la Kölna (Germanio) social-demokrata gazeto «Kölnische Zeitung» enpresis informon pri «amikeco inter bolŝevikoj kaj katolikoj», pri «interkonsento» de la soveta registaro en Ukrainio kun la katolika eklezio. Dum tiuj tagoj en Köln kunsidis la III Kongreso de Internacio de Proletaj Liberpensuloj. La mensoga in-

formo de la social-demokrata gazeto pri «alianco» de soveta registaro kun popoj en Ukrainio donis eblecon al social-demokrato Sievers (gvidanto de Germana Asocio de liber-pensuloj) kalumniadi kontraŭ USSR pro ĝia «paciĝema ri-lato» al la religio. Samtempe la falsaĵo provis pravigi konkordatan politikon de la germana social-demokratio.

La 4 de aprilo 1929 la usona social-demokrata gazeto «Vorwärts» (en hebrea lingvo) skribis, ke estas traktataj inter Sovetunio kaj papaj reprezentantoj diplomataj inter-rilatoj inter USSR kaj Vatikano. La gazeto sciigis, ke la intertraktado proksimiĝas al sukcesa fino kaj, ke kiel so-veta ambasadoro ĉe la papo estas antaŭdifinita k-do Luna-ĉarskij. Ĉi tiuj kaj aliaj similaj falsaĵoj, presataj en social-demokrata gazetaro pri religia politiko de la soveta registaro, estas destinitaj por trompado de progresemaj, konsciemaj tavoloj de laboristoj, por instigi ilin kontraŭ USSR, por konvinki ilin, ke la bolŝevikoj kvazaŭ deiris de siaj revolu-ciaj principoj. Fabeloj pri «konkordato» kun eklezio en USSR estas destinitaj por semi malfidon al USSR inter tiuj progresemaj tavoloj de laboristoj, kiuj simpatias al Sovetio kaj ĝia politiko aparte al politiko rilate al religio, kaj por pravigi sian social-demokratian politikon de konkor-datoj, aliancoj kaj interkonsentoj kun popoj. Kaj vere, precipe multaj falsaĵoj pri la «konkordatoj» estis disvasti-gataj de social-demokrata gazetaro en 1928—1929 jj. al adreso de USSR ĝuste kiam la social-demokratoj kaj Prusia registaro, ĉefata de Braun, preparadis kaj faris konkordaton kun la papo, kiam en Francio la socialistoj voĉdonis por revenigo de monahaj ordenoj en la landon ktp.

Ĝuste, por ke estu pravigita la konkordat-politiko, por ke estu pravigita ilia alianco kun la eklezio, la social-demo-kratoj en 1928—29 skribis «pri alianco» inter la eklezio kaj soveta ŝtato. Tian saman politikon kondukis ankaŭ la tiel nomata «maldekstra» socialista gazetaro. «Volkszeitung» (Frankfurt, Germanio) la 2-an de aprilo 1929 enpresis la gran-dan artikolon—«Religia ondo en USSR spite al kontraŭ-

religia propagando». Ĉi artikolo de Bartels, kiun la redakcio rekomendas kiel grandan «kompetentulon» pri la situacio en USSR, provas pruvi, ke en USSR leviĝas religia ondo spite al ateista propagando, ke «la bolŝevikoj transiris de persekutoj kontraŭ religio al politiko de tolereco kaj per tio al oblikva stimulado»... La aŭtoro provas pruvi, ke en USSR la eklezio transiris al atako. Li elŝiras apartajn informojn el sovetiaj gazetoj kaj pentras ilin misforme, penante montri «bildon» de religiemkresko en la amasoj. Tio estas farata ne sencele, sed por pravigi social-demokratan rifuzon de batalo kontraŭ religio. Bartels skribis, ke kresko de religiemo en USSR certigas la social-demokratian «veron», ke por venki burĝan ideologion necesas antaŭe krei materiajn premisojn [1]).

Ni konstatis duopecan pozicion de la social-demokratio: ĝiaj gazetaro kaj gvidantoj parolas kaj skribas, unuflanke, pri religiaj «persekutoj» en USSR, kaj, duaflanke,—pri la «konkordato» kun la eklezio. Per kio oni povas tion klarigi?

Necesas konsideri, ke ĉio ĉi estas skribata diverstempe. Diversaj cirkonstancoj postulas diversajn bataldevizojn por la kontraŭsoveta kampanio.

La II Internacio simile al la ekleziularo ne rifuzas spekulacii per religio.

Por kurĉasigi kredantajn laboristojn, vastajn amasojn de etburĝaro, «humane»-humorajn intelektulojn ktp., ili, simile al ekleziuloj, kredigas pri ekzisto de religiaj persekutoj en USSR. Por kurĉasigi progresemajn laboristojn kaj

[1]) Kiel estas konate, unu el la social-demokrataj rifuzargumentoj de batalo kontraŭ religio estas maleblecargumento de supero kaj venko de burĝa ideologio, enkalkulante ankaŭ la religion, ne kreinte «materiajn premisojn» t. e. plenan konstruadon de la socialisma socio; dume la socialismo ne estas, — konkludas multaj social-demokratoj — do la batalo kontraŭ religio ne fruktodonas; en la socialismo religio ja formortos, kaj pro tio neceso de batalo kontraŭ religio ankaŭ malbezonos.

pravigi sian politikon de konkordato la social-demokrataj gvidantoj skribas pri la «konkordato» en USSR. Fabeloj pri kresko de religiemo necesas al ili por pruvi «fiaskon» de kontraŭreligia politiko de la soveta potenco kaj la kompartio kaj por pravigi per tio ilian rifuzon de b a t a l o k o n t r a ŭ la religio.

Ankoraŭ en decembro de la j. 1930 (en numero de 27 decembro) la berlina «Vorwärts» ĝoje sciigis, ke la preĝejoj en Moskvo dum kristnaska festo malgraŭ «persekutoj» estis homplenaj. Eĉ se tiel estis, kial do ĝoju social-demokrata gazeto? Sed la social-faŝistoj volas per similaj informoj diri: tie, kie oni «persekutas» religion, kreskas religia ondo, tial pravas ni, social-demokratoj, vivantaj en paco kun la eklezio.

Simile al tio, kiel eŭropaj socialistaj partioj ne konsideris por si nedeca utiligi religion por la kontraŭsovetia propagando, simile al ĉi tio agis la rusiaj menŝevikoj. Ni pli supre diris pri partopreno de la rusia menŝevismo en la «krucmilitiro». Sed krom tio, demandoj de la religia politiko en USSR vigle interesas la menŝevikojn.

Sur paĝoj de «Socialista Heroldo» oni povas ofte renkonti artikolojn kaj notojn, dediĉatajn al la religio, malvere, mensoge pentrantajn situacion en Soveta lando. Antaŭ ĉio unuvoĉe kun ekleziularo kaj la papo, «Socialista Heroldo» skribas tre detale pri «religiaj persekutoj» en USSR. En marto de 1930 «Socialista Heroldo» indignante skribis pri likvidado de preĝejoj:

«Antaŭ kelka tempo estis detruita la kapelo je nomo de dipatrino Iberia. Tion oni motivis kiel neceson faciligi senbaran stratmovadon». Poste, la «Socialista Heroldo» bonkonscience, kiel decas al lakea gazeto penas pruvi, ke ne interesoj de plibonigo de surstrata movado estas kaŭzo de forigo de la kapelo, sed bolŝevikaj intrigoj, kaj aldonis: «Detruado de preĝejoj kaj monaĥejoj nun estas aranĝata vastaskale»... Menŝevikoj, opiniantaj sin «marksanoj», maldolĉe plendas pri malmasonigo de la Iberia kapelo.

Ĉu tio ne estas plej klara pruvo pri degenero de la social-demokratio? Sed en la sama gazetnumero estas pli atentindaj aĵoj, atestantaj tion, kiel la menŝevikaj politikuloj blinde kopias la burĝaron. Estas konate, ke en burĝa ekstersovetia gazetaro oni presis fabelojn pri sociigo de virinoj en USSR. Antaŭnelonge en Usono iu eklezia gazeto skribis pri «sociigo» de virina lakto en USSR, kaj germana popa gazeto asertis, ke en Sovetio estas efektivigita «sociigo de virinaj haroj». Por «Socialista Heroldo» estus tre maloportune presi similajn idiotajn elpensaĵojn. Tial ĝi skribis pri «sociigo de vivmaniero». Jen kion ni ĉi tie legas: «Nune atentocentro de sovetaj civitanoj, enkalkulante komunistojn, estas la kampanio por efektivigo de «sociigo de vivmaniero». Estas antaŭdifinita jena ritmo de «sociigo de vivmaniero»: ĉiuj novaj domoj estos konstruataj adaptite al novaj postuloj, kaj en ili la «sociigo» estos efektivigita plenamplekse. En ceteraj domoj periodo de efektivigado de sociigo estas disponita al «memagemo de la loĝantaro». Nun preskaŭ en ĉiuj grandaj domoj de Moskvo estas organizitaj komitatoj por efektivigi la sociigon kaj jam en multaj domoj «ofensivo» al la familio kaj persona vivo de soveta civitano estas komencita vastfronte. En praktiko la sociigo konsistas el la jeno: En ĉiuj loĝejoj de la domo estas likvidataj kuirejoj, manĝejoj tie, kie ili konserviĝis, t. e. pli ĝuste ĉi tiuj ĉambroj estas rearanĝataj kiel ordinaraj loĝoĉambroj. En malsupra etaĝo de domo estas aranĝataj kuirejoj, manĝejoj, kaj vartejoj. Tuta kuirilaro, tuta manĝeja kaj teknika vazaro kaj tuta tablotolaĵo estas komunigataj. Oni forprenas por infanaro infantolaĵon... Plua stadio estas projektata jene: komunigo kaj egaliga distribuo de meblaro, vestaĵoj kaj tolaĵoj... Ĉi tia aranĝo elvokas teruriĝan koleriĝon...» «Socialista Heroldo» № 5, (219) de 15 de marto de 1930 j. Kion oni povas diri kontraŭ simila evidenta kaj tre ne saĝa mensogo?

Ni vidas sur paĝoj de «Socialista Heroldo» tian saman kalumnion kia estas sur paĝoj de eklezia gazetaro. La men-

ŝevika kontraŭsoveta kalumnio estas iom aliformita burĝe-popa kalumnio, kaj tio estas facile observebla per kelkaj ekzemploj. La menŝevika gazetaro siatempe vigle resonis kontraŭ la kvintaga semajno. Abramoviĉ skribis artikolon en la usona gazeto «Vorwärts» (en hebrea lingvo) la 21 de septembro 1929. «Plu ne estas dimanĉo en Rusio», en kiu li plendas, ke forigo de dimanĉo estas atako kontraŭ laborista klaso. Li plendas pri tio, ke plu estas nek dimanĉo, nek sabato, kaj jen prezentu al vi la situacion de la laborista klaso, kiu nun estas senigita de religiaj festoj. La kvintagon Abramoviĉ nomas «eksterordinara ofensivo kontraŭ laborista klaso». Ĉi tiu «socialisto» kondamnas la kvintagon pro tio, ke ĝi batas kontraŭ religiaj festoj. Laŭ Abramoviĉ, la kvintago «malplibonigas materian staton de laboristaro», batas kontraŭ ĝia kultura kaj morara vivo. Por dimanĉa ripozo, plendas Abramoviĉ, la eŭropa laborista klaso longe batalis. «Tuta vivo nun estas akomodita al dimanĉo, komencante per teatroj, fervojoj, lernejoj, kaj finante per politikaj elektoj, demonstradoj ktp.»—skribis Abramoviĉ kaj indignas, ke la bolŝevikoj rompis ĉi tiun «deantikvan» ordon. Menŝeviko Abramoviĉ ne povas al si prezenti, kiel do povas esti ŝanĝataj, rekonstruataj konstituiĝintaj, tradiciaj institutoj. Burĝo kaj filistro li ne povas prezenti mondon alia, ol ĝi estas dum la kapitalismo. Tial li kroĉiĝas al dimanĉo. Li indignas kontraŭ la bolŝevikoj pro la kvintago, penante, pruvi «malutilecon» de ĉi tiu aranĝo por laboristaro.

Enkonduko de la seninterrompa semajno en Sovetio ankaŭ trovis resonon en paĝoj de la menŝevika «Socialista Heroldo» En № 16—17 de la gazeto (de la 11 septembro 1929) estis presita artikolo de la menŝeviko Ŝvarc «Seninterrompa produktado kaj labortago». Ĉiel pruvante «malprofitecon» de la seninterrompa semajno por laboristoj, Ŝvarc skribas: «Batalo per perfortaj rimedoj kontraŭ influo de la religio, kiel montris la historia sperto, antaŭe estas fiaskonta kaj kreas atmosferon de socia sovaĝiĝo. Forigo

de komuna ripoztago jam per si mem tre malsanece estas akceptata de multaj milionoj de laboristoj kaj oficistoj.» En ĉi tiu «deklaracio» de menŝeviko Ŝvarc, ni antaŭ ĉio trovas rekanton de tio, kion skribis la burĝa kaj popa gazetaro pri la kvintaga laborsemajno. Ŝvarc krias pri «religiaj persekutoj» en USSR kaj li vidas tiujn persekutojn en tio, ke estas enkondukita seninterrompa semajno. Li timigas per la «socia sovaĝiĝo» kiel rezulto de dimanĉforigo. Tamen la sovaĝiĝo estas ĝuste karakteriza por la burĝa Eŭropo kaj Ameriko, sed ne por USSR. Ŝvarc timigas, ke la seninterrompa laborsemajno elvokos malkontenton de laboristoj kaj oficistoj. Nun, kiam Sovetio havas 2-jaran sperton de efektivigita kvintaga laborsemajno, kiom senfortaj elmontras sin la «profetaĵoj» de menŝevikoj Ŝvarc kaj K-o! Ŝvarc agnoskas, vere, ke la homaro iam atingos tiun superan nivelon de la materia kaj socia kulturo, sur kiu estos ebla ripozo de laboristoj eĉ ĉe forigo de komunaj ripoztagoj... «Sed tio estas la muziko de malproksima estonteco» Por menŝevikoj la socialismo ankaŭ estas «la muziko de malproksima estonteco».

La sama menŝeviko Ŝvarc en «Socialista Heroldo» de la 10 oktobro 1929 (№ 19) denove revenas al la kvintaga laborsemajno kaj skribas, ke en Usono oni «sukcese batalas por la kvintago», ke tie jam «nun laboristoj sukcesis atingi en multaj fabrikoj tian distribuon de labortempo, dum kiu ili laboras de lundo ĝis vendredo 8 horojn po tage, kaj plene ili ripozas sabate kaj dimanĉe... Jen kiun necesas atingi kaj superi»... Menŝeviko Ŝvarc konsilas al ni preni ekzemplon de Usono. Sed li «forgesis» diri, ke en Usono estis enkondukita ne nur la kvintago, sed ankaŭ tri kaj du-taga laborsemajno, eĉ simple plena senlabora semajno por 10 milionoj da laboristoj, ĵetitaj pro la krizo en straton! Menŝeviko Ŝvarc «forgesis» diri, ke mallongigo de laborsemajno en Usono kaj en aliaj burĝaj landoj estas efektivigata per laborista konto, per malaltigo de laborpago. Menŝeviko Ŝvarc pri tio «forgesis», laŭdante la amerikan «kvintagon»...

El ĉio dirita ĝis nun estas komprenebla, kial la burĝa kaj popa gazetaro elpaŝis por defendo de menŝevikoj dum la proceso de ilia «Porsovetia oficejo de CK» en Moskvo. La burĝa gazetaro penis prisilenti la proceson de menŝevikoj, sed kiom ĝi skribis pri ili, ĝi senŝanĝe defendis ilin. Same agis la klerikala gazetaro. Precipe gloriĝis la germana popa gazeto «Germanio»—la organo de katolika partio. La 28 de februaro 1931, ĝi enpresis specialan artikolon pri la proceso de menŝevikoj, kie ĝi defendis ilin. La gazeto penis senkonfidigi la sovetan juĝon kaj malfortikigi impreson pro senmaskigoj de kontraŭrevolucia rolo de menŝevikoj. La 11 de marto la gazeto denove revenis al la demando, certigante, ke la proceso de menŝevikoj estis organizita nur por «ardigi politikajn pasiojn». En Svisio, kiam social-demokratoj aranĝis mitingon de «protesto» kontraŭ la moskva proceso, ĝuste katolika gazetaro aprobis tiajn kontraŭsovetiajn demonstraciojn. La 12 de marto brusela gazeto de katolikoj ankaŭ defendis la menŝevikojn. La ekleziuloj bonege komprenas, ke la social-demokration ili havas kiel sian kunulon en batalo kontraŭ la komunismo kaj Soveta Unio.

## Social-demokratio aliancanta kun pastraro

La XI plenkunsido de l'Ekzekutivo de Kominteru (aprilo de 1930 j.), menciis, ke en «krima laboro pri organizado de ekonomia blokado kaj preparo de militintervenco kontraŭ USSR la II Internacio kaj social-demokratiaj partioj senpere partoprenas gvidadon kaj plenrespondecas pro la blokado»... Social-demokratiaj partioj «definitive formiĝis kiel plej grava ilo de la imperialisma burĝaro por ideologia kaj politika preparo de blokado kaj kontraŭrevolucia milito kontraŭ USSR. «Ni vidas, ke la social-demokratio elpaŝas kontraŭ USSR mano ĉe mano kun alia ilo de ideologia militpreparo kontraŭ USSR—kun la eklezio. Kunlaborado kun la eklezio en la kontraŭsoveta fronto

fariĝis ebla ankaŭ dank'al jam stariĝinta kunlaboro inter la social-demokratio kaj la eklezio en aliaj sferoj.

Praktike partioj de la II Internacio ĉie kunlaboras kun eklezio kaj religiaj organizaĵoj laŭprograme, laŭprincipe ili rifuzis batalon kontraŭ religio kaj malfermis vastan liberecon por religia propagando interne de la partioj.

En 1929 j. en Prusio social-demokrato Braun, kiel ĉefulo de la prusia registaro subskribis la konkordaton kun la katolika eklezio, kaj en majo de 1931 j. —kun la evangeliana. En la respubliko de social-demokrato Braun la eklezio estas subvenciata de la ŝtato jare duoble pli, ol de Vilhelmo II. En la respubliko de social-demokratoj, en Germanio—nombro de procesoj pri «blasfemoj» ĉiujare atingas 500, dum antaŭ la milito ili nombris 200. La social-demokratoj policprezidantoj rigore zorgas pri interesoj de la eklezio ankaŭ la policprezidanto de Berlino Zergiebel rigore kontrolas, ke dum religiaj festoj estu aranĝataj neniaj amuzspektakloj. La social-demokrato ministro por internaj aferoj de Prusio Sewering en marto de la j. 1931 iniciatis kunvokon de ministroj por internaj aferoj de germaniaj provincoj por konferenco pri batalo kontraŭ ateismo kaj agitado de liberpensuloj. Ĉiuspecaj leĝprojektoj, prezentataj de komunistoj en germanan raihstagon (parlamenton), kiuj iomgrade koncernas eklezion estas kontraŭvoĉdonataj de social-demokratoj. Ekzemple, kiam la komunistoj prezentas en rajhstagon postulojn abolicii leĝojn pri blasfemo, aborto ktp., en ĉiuj similaj okazoj la social-demokrataj deputitoj subtenis pastraron. En majo de 1929 en urbo Magdeburg okazis la kongreso de social-demokrata partio—kondukanta partio de la II Internacio. Parolinta en la kongreso ĉefulo de la prusia registaro Braun defendis en sia parolado la politikon de interkonsentoj kun la katolika eklezio. Unu el parolintoj en la kongreso, Sollman, deklaris: «La social-demokratio ne povas proklami sin ateista. En ĝiaj vicoj estas ateistoj monistoj, filozofiaj idealistoj, filozofiaj materialistoj, neokantismanoj, protestantoj, katolikoj kaj

judismanoj. Al ĉiuj ili la partio devas liveri liberecon de la konscienco».

Efektive do «la libereco de la konscienco» en la partio reduktiĝas al libereco prediki religion en la partio kaj venenigi partianojn per religia opio.

En praktiko tio elmontras sin tiel, ke la «socialistoj» batalas dum elektoj por preĝejkonsilantaroj por siaj kandidatoj kaj konsideras granda venko por si, kiam ili sukcesis elektigi siajn homojn, anojn de sia partio, en gvidorganojn de ekleziorganizaĵoj. En 1929 j. «Vorwärts» dediĉis specialan artikolon al rezultoj de la eklezielektoj: «Se laboristoj pli organizite partoprenus eklezielektojn, ili ricevus gvidadon en la eklezio»... La gvidantoj de la partio ĉien demonstras sian fidelecon al la «sankta eklezio». Braun, ekzemple, sendas saluttelegramojn al la papo roma okaze de lia 70-jariĝo en 1930, la plej malnova oportunisto Eduard Bernstein okaze de sia 80-jariĝo en 1930 bedaŭresprimis, ke li foriris el religia komunumo antaŭ 50 jaroj. Nun, deklaras Bernstein, mi tion ne farus. Stampfer, la redaktoro de «Vorwärts» en 1929 jaro, en sia salutletero al la katolika ĵurnalo «Ruĝa gazeto de katolikaj socialistoj» skribis: «Antaŭe multaj supozis, ke katoliko ne povas esti socialisto, kaj ke socialisto ne povas esti katoliko. Nun, plimulto jam scias, ke tio estas nur malmoderna antaŭopinio». [1])

La Aŭstrian social-demokratian partion oni konsideras «maldekstra» partio de la II Internacio. Simile al la germania ĝi laboras mane-ĉe-mano kun la eklezio, kaj la «religia libereco» en la partio evidentiĝas eĉ en tio, ke interne de la partio organiziĝis asocio de «kristanaj socialistoj», havante rajton de la sekcio. En novembro de 1929 jaro en la kongreso de ĉi tiuj «kristanaj socialistoj» en Vieno parolis reprezentanto de C. K. de la Aŭstria social-demokratia

---

[1]) Papo Pij XI en sia epistolo pri laborista problemo en majo de la j. 1931 menciis, ke katoliko ne povas esti socialisto, kaj la social-faŝistoj konvinkas la papon pri kontraŭo.

partio Ellenbogen, kiu deklaris, ke la social-demokratio liberiĝis de antaŭjuĝo kontraŭ religio, ke ĝi taksas religion kiel «plej profundan fenomenon de la homa animo», kiel «portanton de superaj ideoj de etiko kaj moralo». Multajn similajn bonkomplimentojn eldiris Ellenbogen al la religio, estanta la standardo de la plej nigra reakcio.

Pri tio, kiom enprofundiĝas ĉi tiu amikeco kun la eklezio, atestas sekvonta gazetinformo («Pravda» 8/VI 1928):

«Laŭ informo de «Neue freie Presse», la social-demokratoj, membroj de la municipaliteto de urbo Matterburg (Burgenlando) sin turnis al Viena ĉefepiskopo kardinalo Pifl, plendante pastron en ĉefpreĝejo en Mattenburg, kiu ne permesis al ili porti baldakenon («ĉielo») dum religia procesio en «tago de sankta spirito». La plendantoj menciis, ke la rajto porti «ĉielo»'n ĉiam apartenis al membroj de la municipaliteto. La ĉefepiskopo kontentigis la plendon kaj klarigis, ke «nuntempe ankaŭ al social-demokrataj membroj de la municipaliteto devas esti prezentita rajto porti la «ĉielo»'n dum religia procesio».

Partiĉefoj de la polia socialista partio (PPS) kunagas, simile al siaj kolegoj, kun klerikaluloj kaj Daŝinskij, unu el la gvidantoj de PPS, montris sin sur «dia grenkampo» per tio, ke li ĉefis komitaton por konstruado de katedralo en Varsovio, kiu devas «eternigi renaskiĝon de Polio».

En 1927 jaro dum elektado por la polia sejmo, PPS publikigis alvokon, en kiu oni substrekas «sanktecon de religia sento» kaj deklaras, ke «la religio ne kontraŭas la socialismon». Per similaj certigoj de sia lojaleco al la religio la «socialistoj» konsideris akiri balotvoĉojn de etburĝaro.

Unu el la partiĉefoj de la franca socialista partio Albert Tomas, gvidanto de la laboroficejo ĉe Ligo de Nacioj, dum lastaj jaroj regule elpaŝas en diversaj eklezi-kongresoj kaj en gazetaro, laŭdante «porpacan» agadon de la eklezio. La gvidanto de la belgia socialista partio Vandervelde ankaŭ estas plena de laŭdoj al la eklezio, kiu, laŭ liaj vortoj,

mano-ĉe-mano kun la social-demokratio «elpaŝas kontraŭ militarisma naciista diktaturo». Do la eklezio de la kapitalismo, benanta furiozajn preparojn al novaj militoj, «elpaŝas kontraŭ militarisma diktaturo». [1])

En 1929 j. la francia parlamento akceptis la leĝprojekton pri restarigo de estintaj rajtoj de monaĥaj katolikaj organizaĵoj. Kiam la demando estis pridiskutata en la parlamento, socialisto Paŭl Beaunkour parolis kaj konsilis voĉdoni por la leĝprojekto pri liverneceso de diversaj rajtoj kaj privilegioj al monaĥaj kongregacioj, menciante tion, ke la fortikigo de la eklezio estas necesa «pro naciaj interesoj de Francio».

Kaj post tio, post kelkaj monatoj, en Nancy okazis kongreso de la francia socialista partio. Antaŭtage de la kongreso la demando pri rilato de la partio al la religio estis pridiskutita sur paĝoj de la partia ĵurnalo «Socialista vivo», kaj jen kiajn perlojn presis la organo de francia socialista partio: «La religio estas akto de kredo al justeco post morto de la socialismo, estas akto de kredo al justeco, kiu eblas sur la tero. Tia estas kontraŭdiro inter le religio kaj la socialismo, kaj ni rajtas interveni en konsciencon de tiuj, kiuj ĉi kontraŭdiron tiel aŭ aliel solvas».

Alia socialisto Reid, eldiras sur paĝoj de la socialista ĵurnalo penson, ke «la religio estas fakto biologia» t. e. kunnaskita kaj sekve paroli pri batalo kontraŭ la religio ne necesas. Kiel estas konate, la pastraro ankaŭ konstatas, ke la religio estas kunnaskita de homo. La demando pri rilatoj de la partio al la religio elvokis ardajn disputojn eĉ en la kongreso mem, kaj ilin oni kondukis jen kiadirekte: «la partio kontraŭas klerikalismon, kontraŭas politikajn pretendojn de la eklezio, sed ĝi ne kontraŭas religion». «La kristanismo estas revoluciema kaj ĝin oni ne'devas miksi

---

[1]) En la eldonita en la j. 1907 broŝuro de Vandervelde «Laborista partio kaj religio» li skribis tute alian kompare kun la skribata nun. Tiam li skribis: «Ankaŭ jam nun... la eklezio estas la plej fidinda rifuĝejo por la privilegitaj klasoj»...

kun la klerikalismo»—konstatis unu el la oratoroj. La alia deklaris, ke la ateismo «kontraŭas la socialistan tradicion». «La bolŝevikoj perforte altrudas la ateismon, sed alproprigo de tia taktiko signifas por ni detruon de partitradicioj»—deklaris deputito Jurin. En la kongreso mem faris grandan raporton la «kristana socialisto» profesoro Filipp, kiu disvolvis la programon de «renoviĝo» de la religio kaj renoviĝo de la socialismo per religio. La kongreso de la franciaj socialistoj pasis sub la devizo: «for ajnajn revoluciajn ateistajn devizojn!»

En Usono, ĉefo de la socialista partio estas pastro Norman Tomas. Li estis kandidato de la socialista partio dum prezidantelektoj en 1928 j. Tomas estas kategoria malamiko de la revolucia laborista klasbatalo. Ankoraŭ pli bonaj ol li estas gvidantoj de usona laborfederacio (AFT). La konferencoj de AFT estas inaŭgurataj per mallongaj diservoj. En la konferenco de AFT, kunvokita por organizado de teksistoj (en 1930 j.) Grin, prezidanto de la federacio, deklaris: «Ni penas kompletigi laboron de la eklezio»,—temas pri «laboro» de la eklezio en sfero de batalo kontraŭ revoluciaj tendencoj en laborista klaso. Gvidantoj de AFT aktive partoprenas kune kun ekleziularo batalon kontraŭ la komunismo.

«La eklezio kaj sindikatoj de Usono estas citadeloj en batalo kontraŭ komunismo»—ĉi tiuj vortoj finas la kunsid-rezolucion de la ekzekutivo de la Usona reformista ministsindikato (aprilo de 1928 j.).

Grin, la prezidanto de Usona laborfederacio, en unu el siaj predikoj deklaris, ke «agado de la organizita laboro (t. e. de gvidantoj de AFT—M. Ŝ.) paŝas paralele kun agado de la eklezio». Tute ĝuste: unuj kaj aliaj faras la saman aferon kaj servas al la sama mastro.

La AFT-gvidantoj mem predikas en preĝejoj kaj vaste laboras por venenigi konsciencon de laboristaro per religio, intime kunlaborante kun pastroj kaj bankposedantoj. La Anglia laborista partio, antaŭnelonge registara, simile al

la «socialistaj» partioj de la kontinento, kunlaboras kun la eklezio kaj helpas al la burĝaro malfandigi laboristan movadon per religio, venenigi per religia bigoteco la laboristan klason de Anglio. Gvidantoj de la laborista partio—mem estas kredantoj; post laboroj en ministrejoj aŭ en sindikatejaj oficoj ili ofte iras en preĝejojn por prediki. La gvidanto de la partio Makdonald estas fervora kristano. En 1925 jaro, li kiel ĉefulo de angla «laborista» registaro salutis tutmondan kongreson de eklezioj en Stokholmo: «Situacio de la tuta mondo mem denove vokas helpon de la kristana spirito ne nur kiel de juĝisto kaj kuracisto, sed ankaŭ kiel de gvidanto»—skribis li en sia salutletero al la popoj.

Henderson la eksministro por eksteraj aferoj ĉe Makdonald, faras predikojn en preĝejoj, Tomas—ankaŭ. Parmur, kiun ni vidis en la lordoĉambro indignantan kontraŭ «religiaj persekutoj» en USSR, estas unu el la gvidantoj de «Asocio de ekleziamikoj» kaj aktiva partoprenanto en diversaj aliaj religiaj organizaĵoj. Simile al ili, ankaŭ aliaj gvidantoj de la laborista partio profunde estas trasorbigitaj per religia bigoteco kaj hipokriteco. La presorgano de la laborista partio «Deil Herald» enpresas religiajn artikolojn pri la pasko, pri tio, ke substituo de vino je sango de kristo ne kontraŭas al la scienco ktp.

Similajn ekzemplojn de intima kunlaboro de la eklezio kun la social-faŝismo oni povus citi nekalkuleblan nombron rilate al ĉiuj sekcioj de la II Internacio.

Oni atentu ankoraŭ nur unu sekcion—tiun de la rusaj menŝevikoj. Ni pli supre jam rimarkigis, ke la menŝevikoj defendis la religion «persekutatan de bolŝevikoj», kiel ili veturigas kontraŭsovetian ĉaron de la papo roma. Menŝeviko Dalin en sia artikolo «Batalo kontraŭ religio», dediĉita al la «krucmilitiro» (ĵurnalo «Socialista Heroldo», de la 15 marto 1930) skribis: «En eksterlando, inter la elmigrintaro, kie respeguliĝas, kvankam eĉ en kurba spegulo kelkaj procedoj de idea evoluo de Rusio, jam tre klare kres-

skas religiemo. Ĝi kaptas jam rondojn de estinta radikala inteligentularo kaj eĉ kelkajn socialistajn rondojn. En la social-revolucia partio, la partio de la senkompatemaj herooj-ateistoj, de carmortigistoj kaj ribeluloj, ortodoksa kaj judisma religiemo rapide konkeras korojn, kaj transformigas estintajn teroristojn je humilaj infanoj de la eklezio. La fenomeno estas ne individua, sed grupa»...

Menŝeviko Dalin mem agnoskas, ke renaskiĝo ankaŭ en vicoj de la rusia elmigrintaro, interalie, en sekcio de la II Internacio, troatingis—ĝis aliformiĝoj de sinjoroj socialistoj je «humilaj infanoj de la eklezio». Tio rilatas same al la menŝevikoj, kiel al la eseroj. La lastaj ankoraŭ dum la civila milito en Norda Rusio (registaro de esero Ĉajkovskij) kaj en la Orienta, tie, kie ili por iom prenis la potencon, ili senŝanĝe kunlaboris kun la eklezio. [1]) Kaj nun en eksterlando ne nur rusia eksaristokrataro, sed ankaŭ estintaj teroristoj kaj «nunaj «socialistoj» estas kaptitaj de mistikisma ondo.

Elmigrintoj de ĉiuj tendencoj komencante de la dekstra—monarkista ĝis la «socialista» kies esperoj pri baldaŭa falo de la Soveta potenco fiaskis, laŭ trafa esprimo de la blankula revuo «Utverĵdenija» (Parizo № 1 1931) «provas superigi «ekziston» per «konscio». La mondo reala, la «ekzisto» alportis al ili kaj ĉiam alportas novajn kaj novajn senreviĝojn, rompiĝas unu post la alia esperoj pri «fino» de la bolŝevismo, kaj kune kun tio kreskas deziro superigi la «ekziston» per «konscio», per religio, per forkuro el socio en monaĥejojn, en preĝejojn. Ĉi tiuj humoroj influas en «socialistaj» rondoj de la elmigrintaro, kaj ni povas fidi

---

[1]) La socialista registaro de eseroj en Arĥangelsk ekzemple konservis religian instruon en lernejoj, kiel devigan disciplinon. En unu el ĝiaj decidoj ni legas: «Komisii al generalo Zverincev interrilati kun ekleziestraro pro deziro dum celebraj diservoj proklami preĝon pri multjara vivo al la Supera regantaro» (t. e. al la esera registaro). Rigardu pri tio I. Minc — «Angla intervenco kaj norda kontraŭrevolucio», pĝ. 19).

al menŝeviko Dalin atestanta, ke kreskas religiemo en vicoj de «socialista elmigrintaro».

La interna «socialista elmigrintaro»—splito de la menŝevismo—ofte kondukas malutiligantan laboron sub flago de la eklezio. Ekzemple, en la kontraŭrevolucia organizaĵo «Unuiĝo por liberiĝo de Ukrainio» aktive partoprenis funkciuloj de la Ukrainia aŭtokefala (aŭtonoma) eklezio, sed en ĉi tiu eklezio inter 577 pastroj estis 55 ekssocialdemokratoj kaj eseroj. Ni ofte renkontas eserojn kaj eksmenŝevikojn kiel gvidantojn de eklezioj kaj sektanaj organizaĵoj.

Kiam en Moskvo estis malmasonita la kapelo de Iberia dipatrino, Kerenskij dediĉis al la «okazintaĵo» grandan fruntartikolon en sia revuo «Dni» (11 de aŭgusto, 1929) kie li atakis la sovetian registaron pro rekonstruo de preĝejoj por lernejoj kaj kluboj, nomante tion «aktoj de plej sovaĝa vandalismo».

«Kiu konas Moskvon, tiu ne povas al si prezenti la kremlajn murojn sen la Iberia kapelo, sur kies ŝtupoj eĉ dum plej malfrua nokta tempo ĉiam iu preĝis, iu ploris»... aklamas «socialisto» Kerenskij. La tuta malfeliĉo estas, ke mankas loko por plori! Kaj la sinjoroj Kerenskij'oj kaj iliaj mastroj—francaj borsuloj—tre volas, ke laboristaro de USSR ploru.

## Pri la devizo, ke «religio estas privata afero»

Elpaŝante en praktiko kiel subtenantoj de klerikala reakcio, partioj de la II Internacio pravigas sian pozicion per la akceptita en ĉi tiuj partioj principo «Religio estas privata afero». Ĉi tiu devizo, en kiu estas esprimita rilato de la social-demokratio al la religio, kune kun plifortiĝo de oportunismaj elementoj en vicoj de la social-demokratio kune kun ilia transnaskiĝo je burĝaj partioj, estas traktata ĉiam pli multe en akceptebla por la eklezio senco. En 1875 j. la devizo «religio estas privata afero» estis akceptita en la kongreso de la Germania socialista laborista partio

en Hota. Jam tiam Marks skribis, ke tio tute ne sufiĉas, kaj ke la laborista partio devus deklari, ke «ĝi, kontraŭe, akcelas liberigi konsciencon de ĉiuj religiaj diablaĵoj». Sekve Marks postulis, ke la socialista partio ne limigu sin per la modesta devizo «Religio estas privata afero», sed malkaŝe deklaru, ke ĝi «akcelas liberigi konsciencon de ĉiu religia diablaĵo» t. e. senkaŝe deklaru sin ateista partio.

Poste en 1891 jaro, en la kongreso de la Germania socialdemokrata partio en Erfurt, la rilato de la partio al la religio estis formulita jene: «Deklaro de la religio kiel privata afero, nuligo de ĉiuj asignoj el soci-financoj por religiaj kaj ekleziaj celoj. Ekleziaj kaj religiaj asocioj devas esti traktataj kiel privataj asocioj, tutplene memstaraj en siaj aferoj». Engels konsideris, ke ĉi tiuj postuloj estas tute ne sufiĉaj kaj en sia kritiko de la projekto de la Erfurta programo proponis jenajn programpostulojn: «Plena apartigo de la eklezio for de la ŝtato. Senescepte ĉiuj religiaj asocioj estas taksataj de la ŝtato kiel privataj asocioj. Ili devas esti senigitaj de ĉiuj subteno el ŝtataj rimedoj kaj de ĉiu influo al ŝtataj lernejoj».

En la Herlitza programo (1921 j.) de la germania socialdemokratio rilato de la partio al la eklezio estas formulita: «Religio estas privata afero, afero de interna konvinko, sed ne afero de la partio kaj ne afero de la ŝtato»... Sammaniere estas traktata la problemo ankaŭ nun en la germania kaj aliaj socialistaj partioj: «Religio estas privata afero».

Lenin en 1908 jaro en la artikolo pri rilato de la laborista partio al la eklezio skribis, ke: «La deklaro de religio «privata afero», tiu ĉi taktiko sukcesis naski novan fuŝadon de la marksismo en la flankon inversan, en la flankon de oportunismo. Oni komencis trakti la tezon de la Erfurta programo tiusence, ke ni, social-demokratio, nia partio konsideras la religion privata afero, ke por ni, kiel partio, la religio estas privata afero. Ne komencante senperan polemikon kontraŭ tiu ĉi oportunisma koncepto, Engels ĉirkaŭ la jaro 1890 konsideris necesa decidece kontraŭbatali ĝin,

ne en la polemika, sed en la pozitiva formo. Nome Engels faris tion ĉi en la formo de deklaro, intence de li substrekita, ke la social-demokratio konsideras religion privatafero rilate al ŝtato, sed nenielrilate al si, nek rilate al marksismo, nek rilate al la laborista partio».

Lenin ĉi tie atentas rimarkon de Engels pri demando «Religio estas privata afero», eldirita de li en 1891 j. en la antaŭparolo al «Civila milito en Francio». Parolante pri Pariza Komuno de 1871 j. kaj pri la efektivigita de ĝi dekreto pri la eklezi-apartigo de la ŝtato, Engels skribis: «La Komuno konsistis preskaŭ sole el laboristoj aŭ el adeptoj de la laborista klaso, pro tio ĝiaj dekretoj distingiĝas per firma proleta karaktero. La komuno deklaris parte tiajn reformojn, kiujn nur pro nia malkuraĝeco ne realigis la respublika burĝaro, sed kiuj estis la fundamenta kondiĉo por libera agado de l'laborista klaso, ekzemple, realigo de la principo, ke «la religio rilate al la ŝtato (estas substrekita de Engels) estas privata afero».

Sendube, ke Engels, substrekante ĉi tiun lokon, celis la Erfurtan programon, kie oportunistece estis traktata la devizo «Religio estas privata afero». [1])

Tio estas tute alia ol la klarigo de la devizo, traktata de la social-faŝistaj teoriuloj. Engels substrekis, ke la religio estas privata afero rilate al ŝtato, sed ne rilate al la partio.

Lenin, sekvante Marks kaj Engels, substrekis, ke por la partio de laborista klaso la religio ne estas «privata afero», ke ĉi tiun postulon la social-demokratio prezentas al la ŝtato — akcelas ekleziapartiĝon de la ŝtato, liberecon de la konscienco, lernejapartigon de la eklezio ktp., sed rilate al la laborista partio la problemo estas metata alie:

---

[1]) Solmann unu el la gvidantoj de la germania social-demokratio, en la revuo «Socio» en aŭgusto de 1927 j. skribis: «Profunda fundamento kaj senco de la fama frazo pri la religio kiel «privata afero», estas en tio, ke la marksismo estas kunigebla kun diversaj mondkonceptoj».

laborista partio devas batali kontraŭ religio, sed ne konsideri ĝin por si privata afero.

La socialista partio batalas kaj devas batali kontraŭ religio. «Ni devas batali kontraŭ religio. Tio estas ABC de la tuta materialismo kaj sekve de la marksismo»—skribis Lenin.

Traktante religion privata afero por si, kiel por la socialista partio, kaj sekve privata afero por ĉiu aparta partiano,—la social-demokratio prezentas al siaj anoj plenan liberecon en religiaj kaj filozofiaj demandoj. Ĝi partianiĝas (kaj volonte partianigas) pastrojn (la gvidanto de la Usona socialista partio Norman Tomas—estas pastro). Ĝi permesas al gvidantoj de l'partio prediki en preĝejoj (tiurilate tre bone trejnis la gvidantoj de la Anglia laborista partio). Ĝi permesas organizi interne de la partio la Asocion de Kristanaj socialistoj. Ĝia partigazetaro enpresas religiajn artikolojn ktp. La devizo «Religio estas privata afero» tiamaniere vaste malfermis pordon por pastraro kaj religio en vicojn de la II Internacio.

Sian rifuzon de batalo kontraŭ religio la social-demokratio klarigas tiel, ke senkaŝa proklamo de kontraŭreligiaj devizoj forpuŝus de la partio kredantajn amasojn. Pri ĉi tiu cirkonstanco skribis Otto Bauer, la teoriulo de la aŭstria social-demokratio en la broŝuro «Social-demokratio, religio kaj eklezio». La broŝuro estas skribita en la j. 1927 por defendi Lincan programon de la aŭstria social-demokratio. Bauer en la antaŭparolo skribas, ke la plej grava tasko de la partio—estas konkero de amasoj. Konkero de la kamparanaro al flanko de la social-demokratio trovas sian malfacilaĵon ne nur en la agrara problemo, sed ankaŭ en la religia problemo. «La burĝaro,—skribis li,—povas nur pro tio regi, ke la eklezio ekspluatas religiajn sentojn de popolamasoj tiel, ke estu konservita regado de la burĝaro»... El tio oni konkludas, ke la malbono estas ne en la religio, sed en la ekspluatado de religio pere de eklezio (!?) por interesoj

de l'eksplunatistoj, kaj plue—el tio sekvas la tasko batali kontraŭ la klerikalismo, sed ne kontraŭ la religio. Tia dispartigo de la ekspluatista eklezio de la «ekspluatata» religio sendube helpas al ĉiuj tiuj elementoj, kiuj, celante konservi reakcian influon de l'religio al amasoj, estas pretaj ataki la klerikalismon, pastrojn kaj tutan eklezi-organizaĵon, ĉiel pravigante la religion.

Kiel do oni rilatu al religio?

Bauer en sia broŝuro provas «klarigi» la pozicion de VKP(b) (Tutsovetia Komunista Partio bolŝevika) rilate al la religio. «La diferenco inter ni kaj bolŝevikoj,—skribis li,—estas en tio, ke la bolŝevikoj konsideras sin avangardo, progresema parto de la proletaro kaj ili ne starigas antaŭ si la celon allogi en la partion tutan proletaron. Nome tial, ke ili unuigas nur progresemajn, plej konsciajn tavolojn de l'proletaro, kiuj rompis tradiciojn de l'pasinto, tial ili ne taksas la religion privata afero, sed eksigas la kredantulojn el la partio. Sed en Aŭstrio—diras Bauer—ĉiuj partioj batalas por konkeri proletajn amasojn. Se ni, social-demokratoj ilin ne kaptos, tiuokaze ilin ekkaptos per siaj organizaĵoj burĝaj partioj. Ni devas atingi, por ke ĉ i u j proletaj amasoj estu konkeritaj de ni, kaj pro tio ni ne povas meti kontraŭreligiajn devizojn.» Laŭesence Bauer agnoskas, ke timante forpuŝi de la partio etburĝajn amasojn, la social-demokratoj rifuzas de batalo kontraŭ la religio. Menŝevikaj partioj ne estas laboristaj partioj.

En la Gorlitza (1921 j.) programo de la germania social-demokratio estas substrekita, ke la partio estas ne laborista partio, sed ĝi estas «partio de laborula popolo en urbo kaj vilaĝo»...

En la Linza (1926 j.) programo de la aŭstria social-demokratio kiel granda atingaĵo de la partio estas menciita, ke ĝi enkaptis ne nur laboristojn, sed ankaŭ oficistojn, metiistojn, rangulojn ktp.

Ankoraŭ pli intense substrekas sian ne proletan, sed «tuthomaran» karakteron la programo de la Anglia laborista

partio. Tie estas dirite, ke «la laborista partio parolas ne kiel agento de tiu aŭ alia klaso, sed kiel politika organo kreita por esprimi bezonojn kaj celadojn de ĉiuj, kiuj partoprenas laboron—destinitaĵon de la homaro». Ĝuste pro tio, ke partioj de la II Internacio ne estas laboristaj partioj, ĝuste pro tio, ke ili konsideras por si pleja atingaĵo venon de et- kaj egburĝaro en la partion [1])—ili ne deziras per radikalaj devizoj forpuŝi de si etburĝajn kaj burĝajn tavolojn.

Otto Bauer motivigas la social-demokratian rifuzon de batalo kontraŭ la religio per tio, ke tia batalo povas fortimigi de la partio laboristajn kaj etburĝajn amasojn.

«Marksano devas scipovi konsideri la tutan konkretan medion, ĉiam trovi, limon inter anarkismo kaj oportunismo (tiu ĉi limo estas relativa, movebla, ŝanĝema, sed ĝi ekzistas), enfali nek en la abstraktan, pervortan, reale malplenan «revolucionismon» de anarkisto, nek en la filistrecon kaj oportunismon de etburĝo aŭ liberala inteligentulo, kiu timetas batalon kontraŭ religio, forgesas pri tiu ĉi sia tasko, interpaciĝas kun kredo je dio, estas gvidata ne de la interesoj de klasbatalo, sed de la malgrandeca, etskala prikalkulo: ne ofendi, ne forpuŝi, ne timigi de la saĝega regulo:«Vivu kaj lasu vivi al aliuloj» ktp. (Lenin—«Pri rilato de laborista partio al religio», volumo XI, parto I). La social-demokratoj sin gvidas ĝuste per la regulo: «ne ofendi, ne forpuŝi, ne timigi» kaj atakante klerikalulojn, ili ĉiel pravigas religion kaj ĉiarimede substrekas sian estimon, kaj eĉ sian fidelecon al eklezio kaj religio. Pri la klasa rolo de religio ili ne diras. Ili fermas okulojn kontraŭ tio, kiel sub flago de religio kaj eklezio la burĝaro organizas reakciajn fortojn por batalo kontraŭ la laborista klaso, ili ne volas vidi, kiel religio malmoraligas laboristan movadon, malfortigas

---

[1]) En 1928 j. al la Usona socialista partio aliĝis familiano de milionulo Vanderbild. Okaze de tio, «socialisto» Kolman skribis pri «renaskiĝo de la socialista partio» konekse kun aliĝo al ĝi de «ido de unu el plej riĉaj homoj en la mondo».

kontraŭstaremon de la laborista klaso, edukas en ilia konscienco malutilajn ideojn pri komuneco de interesoj de ĉiuj homoj, pri la klasa paco, edukas en ĝi malamikemon al la socialismo. Stampfer, la redaktoro de Berlina «Vorwärts», ankoraŭ en la j. 1905 en la artikolo «Religio estas privata afero», kie li komentarias ĉi tiun punkton de la Erfurta programo, skribis, ke: «se la social-demokratoj okupas sin pri religiaj problemoj, do ili faras tion pro morala instigo, pro ŝato al vero».

Ne interesoj de la klasbatalo de la proletaro, sed «ŝato al vero»—jen per kio estas klarigata tio, ke kelkiuj socialistoj okupas sin pri religio. La social-demokrato penas pastrece transporti la demandon en sferon de disputoj pri abstrakta vero, pri moralo ktp. sed ne en politikan sferon, sole ĝustan. Stampfer plue klarigas, ke la devizo «Religio estas privata afero» ne signifas, ke la religio estas indiferenta afero. La religio, kiu «volas malhelpi al la scienco», kiu batalas kontraŭ politikaj kaj ekonomiaj postuloj de la social-demokratio per argumentoj de la kredo,—tia religio estas malamiko de la social-demokratio kaj «kiom ĝi estas tia, kontraŭ ĝi necesas batali, kvankam jam pro interesoj de sindefendo». Kurioza problemtraktado! Stampfer traktas du malsamajn abstraktajn religiojn: unu, batalanta per siaj dogmoj kontraŭ la socialismo kaj scienco, kaj la alia,—pureca, «senpolitika». Nur kontraŭ la unua oni devas batali! Certe, fakte ekzistas nur sola religio, kiu elradike estas malamiko por la socialismo kaj scienco. Sperto de la tuta antaŭa homa historio kaj sperto de moderna klasbatalo sufiĉe difinite montris, ke religio ĉiam estis kaj restas apogilo kaj ilo de ekspluatistoj. Divido je bona kaj malbona, estas nur vojo por purigo de religio por ĝin fortikigi, la vojo, laŭ kiu paŝas nun plej saĝaj grupoj de eklezioj. Kiel ni vidas, malantaŭ de tiuj sin trenas la socialdemokratiaj partioj. Vandervelde en la jam suprecitita artikolo «Laborista partio kaj religio» skribis delonge antaŭ la milito, ankaŭ skribas, ke la social-demokratio ne devas

fortimigi de si per sia pozicio en religiaj demandoj. «Necesas, ke la socialista partio staru malproksime de la sektana politiko, malhelpanta kaj ne toleranta tiujn opiniojn aŭ sentojn, kiujn ĝi konsideras eraraj kaj eĉ absurdaj, sed kiujn oni devas estimi»,—skribis Vandervelde. Tamen ne estas komprenehle kial «absurdajn opiniojn» oni devas nepre estimi? «Ĉu ne estas malĝoje, ekzemple,—skribas Vandervelde,—aŭdi, kiam niaj kamaradoj kantas jenan kupleton el Karmanjolo, kiun oni prenis el la plej malbona repertuaro de l' revolucia burĝaro kaj kiun mi ĉiam aŭskultis kun abomeno. «La kriston—al rubej', Virginon—al bovej',—dipatron—al satan'».

«Kiamaniere ekzistas socialistoj, tiom malbonkonsciencaj kaj nesaĝaj, por ke ili ofendu krucumiton—la viktimon pe fariseoj kaj pastroj kaj Sanktan Virgulinon (ĉio kun titolaj literoj. M. Ŝ.)—ĉi tiun grandegan modelon de la patrinaj suferoj»... Adorkliniĝo antaŭ eklezio kaj ties «sanktaĵoj» ĉe sinjoro Vandervelde naskiĝis, kiel ni vidas, ne hodiaŭ, ne dum tagoj de la «krucmilitiro» sed trovas radikojn en lia pasinto. Plinobligi religion, fari ĝin «akceptebla» por laboristoj kaj inverse starigi antaŭ la burĝaro, precipe antaŭ la etburĝaro, ludanta rolon de vera defendanto de «vera» religio,—jen estas komisio, kiun prenis je si la socialdemokratio. Ne estas mirinde, ke tiuj popaj elementoj, kiuj starigas antaŭ si la saman celon—purigon de religio,—trovas por si ozilon en vicoj de la social-demokratio. Atentindan ekzemplon montras la ekzisto de sekcioj de tiel nomataj «religiaj socialistoj» inter skribitaj partioj en eŭropaj landoj. La devizo de la germaniaj religiaj socialistoj estas «per la kristana religio al la socialismo, per la socialismo al la kristana religio».[1])

---

[1]) En la gazeto de «Asocio de kristanaj socialistoj en Germanio» «Religia Socialisto» № 20 de 1931 j. okaze de la estinta en majo kongreso de la social-demokrata partio estis presitaj kelkaj artikoloj pri interrilatoj de kristanaj socialistoj kun la socialdemokratia partio, kies parto ili estas. Kaŭzo por la arti-

La moderna social-demokratio ambaŭpiede enkreskis en la kapitalismon kaj estas ĝia fidela apogilo. La Germania social-demokratia partio havinta antaŭ la milito 90% da laboristoj en sia konsisto, nun estas ege fluidigita per etburĝaro. Miloj da ĝiaj anoj laboras en aparato de burĝa ŝtato kaj bonege servas al la burĝaro en rolo de superaj oficistoj, ranguloj, policestroj ktp. Burokrata oficista elemento, ĵurnalistoj, parlamentanoj politikuloj, rajtigitoj de municipalitatoj—jen kiu ludas grandegan rolon en la partio.

En la j. 1925 en la germania social-demokratio nombris 50000 funkciuloj en sindikataj, kooperaciaj organizaĵoj, en malsanulkasoj. Al tiu nombro kalkulu ankaŭ 10 000 provincajn, vilaĝajn kaj urbajn rajtigitojn, 30 000 komunalajn rajtigitojn, 400 urbestrojn kaj urbkonsilantojn, 2000 anojn da registaroj kaj policprezidantojn ktp. Antaŭ la Leipziga kongreso (majo-junio de la j. 1931) de la germania social-demokratio «el unu miliono da membroj 3000 mil enkreskis en la ŝtatan, polican, sindikatan ktp. aparaton. El 2148 deputitoj de reiĥstago (ŝtatparlamento, kaj de ĉiuj landtagoj (provincparlamentoj) 662 estas membroj de la social-demokratio. El ĉiuj urbestroj de Germanio 1/3 estas membroj de la social-demokratio». («Pravda» de 12/VI—31). Tiamaniere evidentiĝas plena kunkreskigo de la social-faŝistaro kun la burĝa ŝtato. En Francio la parlamenta sek-

---

koloj estis tio, ke la gazeto «Socialista Liberpensulo» proponis la projekton al la partikongreso, en kiu ĝi akre atakas la kristanajn socialistojn, deklarante «ke predikante devizon de interklasa frateco, la kristanaj socialistoj fariĝas vole ne vole servistoj de la kapitalo. Responde al tio, la gazeto de kristanaj socialistoj publikigis proteston, proponitan de la asocio de Kristanaj socialistoj al la partikongreso kontraŭ tia rilato al ili kaj postulis, ke la partio elektu kristanajn socialistojn en siajn gvidorganojn, komisiu al ili redaktadon de partia gazetaro ktp. Ĉu tiuj homoj tiel bone sin sentas en vicoj de la social-demokratio, ke nun ili postulas por si gvidpostenojn de la partio kaj prezentas al la partio utilmatumojn.

cio de la socialistoj (elektoj de la j. 1924) el 104 deputitoj havis en sia konsisto nek unu laboriston, austataŭ tio, ni inter ĉi tiuj 104 havas: 13 — advokatojn, 41 — rangulojn, kaj oficistojn, 5 — kuracistojn kaj inĝenierojn, 4 — universitatajn profesorojn, 6 — instruistojn k. a... Ĉiuj ĉi homoj, same kiel grandega rangulkonsisto, troviĝanta en vicoj de la germania kaj aliaj social-demokrataj partioj, delonge deŝiriĝis de la laborista klaso, kaj havas nenion komunan kun ĝi, kaj kun ĝiaj bezonoj. Leon Blum la gvidanto de francaj socialistoj per eksedzigaj aferoj de reĝaj geeminentuloj profitakiris milionan propraĵon. La gvidantoj de Usona federacio de laboro estas plejgrandaj riĉuloj ktp. Ĉi tiuj homoj kunkreskiĝis per tuta sia estaĵo kun la burĝa socio. Sed ĉar la religio estas unu el apogiloj de la burĝa socio, ankaŭ la social-demokratio, la dua apogilo de la burĝaro, nature ne nur ne elpaŝas kontraŭ religio, sed inverse kunlaboras kun la eklezio sur kampo de la kunbatalo kontraŭ revoluciaj humoroj en amasoj, kontraŭ la komunismo, kontraŭ USSR.

Freŝan atentindan ekzemplon prezentas la hispana revolucio de la aprilo de la j. 1931. La provizora registaro post forkuro de la reĝo Alfonso, kunmetiĝis el reprezentantoj de burĝaj kaj socialistaj partioj.

Unu el taskoj, kiujn devas solvi la hispana revolucio, estas agrarproblemo, konfisko de bienulaj kaj ekleziaj terposedaĵoj, kaj ankaŭ senigo de la katolika eklezio je ĝia feŭdula potenco (apartigo de la eklezio for de la ŝtato unuavice).

Nek tion, nek alion la provizora registaro de l'burĝaro faris kaj sinjoroj ministroj -«socialistoj» eĉ ne pensis postuli potenco-limigon de la eklezio kaj konfiskadon de ĝiaj terposedaĵoj.

Nur la partioj de la Komunista Internacio senkaŝe deklaras sian ateistan programon, ĉiurimede malfermas laboristajn okulojn kontraŭ malnobla reakcia rolo de l'religio. Nur la partioj de l'Kominterno, subigante sian batalon kontraŭ

religio al ĝeneralaj taskoj de la klasbatalo proleta, ĉefas batalon de l'laborista klaso kontraŭ ĉiuspeca mezepokaĵo, kiu nun denove triumfas en la kapitalisma mondo. Tio havas nenion komunan kun social-faŝistaj timigoj pri tio, ke al la partio de l'proletaro, deklaranta ateistajn devizojn en sia programo, minacas danĝero sektiĝi. Tion plej bone montras ekzemplo de la germana komunista partio, kiu insiste batalas kontraŭ la kontraŭrevolucia pastraro, kiel kontraŭ kunaganto de l'faŝismo kaj agento de la kapitalo. Ĉi tiu partio nek unu minuton estis sekto kaj estas vera amasa proleta partio. En sia batalo kontraŭ la kapitalo ĝi kondukas post si ne nur revoluciemajn laboristajn amasojn, sed ankaŭ laboristojn el kristanaj sindikatoj, mobilizante ilin batali por vivpostuloj de laboristoj. En praktiko de la klasbatalo ĉi tiuj laboristoj, membroj de kristanaj sindikatoj spertiĝas kompreni la kontraŭrevolucian rolon de religio kaj eklezio kaj foriras el klerikalaj organizaĵoj en la komunistan partion kaj revoluciajn sindikatojn.

Dum lastaj jaroj en Germanio (kaj en aliaj landoj) tio fariĝis vasteokazanta fenomeno.

---

La social-demokratio degeneris kiel partio de l'reakcio, partio de l'burĝa kontraŭrevolucio, kiel «plej ĉefa socia apogilo de l'burĝaro en ties batalo kontraŭ la proletaro» (tezoj de la XI plenkunsido de EKKI). Ĝi kuniĝas por ĉi tiu sia agado kun ĉiaj aliaj reakciaj fortoj kaj kun plej granda el ili — kun la eklezio kaj religio. Tamen ĝi ne nur aliancas kun la eklezio, sed ĝi mem estas influata de klerikaligado, simile al tio, kiel nun de ĉi procedo estas enkaptita la kapitalista socio. En la Leipziga kongreso de la social-demokratoj (majo-junio de 1931) la raportinto pri la «anarkio de l'kapitalisma ekonomio kaj la laborista problemo» Tarpov — deklaris: «Ni estas devigitaj esti kuracisto, kiu devas kuraci la kapitalismon». Kaj la tuta agado de ĉiuj partioj de la II Internacio estas direktita al tio, por ke iel-ajn estu sanigita la kapitalismo, estu gardita,

konservita la hegemonio de l'kapitalo, por ke ne estu okazinta la proleta revolucio, por ke ĝi estu sufokita tie, kie ĝia danĝero por la burĝaro kreskas. Kaj necesas rilate al tio esti justa, — la social-faŝistoj ne malbone plenumas ĉi tiun aferon. Ja ne sencele en Germanio ili okupis por si postenojn de policestroj. La eklezio kaj religio en sia sfero faras la saman aferon, kiun faras la social-faŝismo, — ili fortikigas la disfalantan domon de la kapitalismo. Jen kial la social-faŝismo plej intime kunlaboras kun pastraro kaj ĉiurimede defendas sian kunfraton ĉe fronto de sufokado de la laborista movado. En la Leipziga kongreso Zolman atakis liberpensulojn (ateistojn) kaj laŭdis la drakonajn leĝojn, nun eldonataj kontraŭ ili en Germanio. De la oportunismo en teorio («religio estas privata afero por partio»)— ĝis la koalicio kun la katolika centro, ĝis la konkordatoj kun la eklezio, ĝis la kunaj kun la papo atakoj kontraŭ la komunismo kaj USSR — jen estas la vojo de la II Internacio.

## Social-demokratio en internacia ateista movado

La social-demokratoj ludas ankoraŭ ĝis nun grandan rolon en ateista movado de kapitalistaj landoj. Praktiko de lastaj jaroj montris, ke en multaj landoj la social-demokrata gvidado de l'liberpensulaj organizaĵoj kondukas al degradiĝo, al malaltigo de l'politika nivelo en ĉi tiuj organizaĵoj, al malsolidiĝo de ĉia politika enhavo de ilia laboro, al transformiĝo, plejbonokaze en kulturajn organizojn. Ĉiuflanka klarigado kaj senvualigo de social-demokratia politiko en ateista movado estas insiste necesa.

Ĉi problemo nuntempe estas ekskluzive grava kaj politike akra, eĉ pro tio, ke en membrovicoj de liberpensulaj organizaĵoj, gvidataj de la social-demokratio, ekzemple en Germanio, oni kalkulas ĉirkaŭ 590 000 laboristojn, en Aŭstrio 40 000 ktp., dum en revoluciaj organizaĵoj de proletaj li-

berpensuloj en ĉi tiuj landoj la nombro de anoj ankoraŭ estas sufiĉe plimalmulta.

La social-demokratoj, ĉefante liberpensulajn (ateistajn) organizaĵojn estas devigitaj gvidi dualisman politikon, kiun diktas al ili la ĝenerala politiko de l'social-demokratio rilate al religio. Kiel membroj de la social-demokrataj partioj, kiel ties funkciuloj, gvidantoj de liberpensulaj organizoj ne povas dece batali kontraŭ religio, ĉar la batalo kontraŭ la klerikalisma ofensivo, ne eblas sen batalo kontraŭ tiuj, kiuj senbarigas vojon por klerikaluloj, ne estas supozebla sen forvualigo de la demokrata politiko socialfaŝisma. Jen kial la social-demokratoj, gvidantaj liberpensulajn organizaĵojn limigas sin kaj agadkampon de siaj organizaĵoj. Tamen, samtempe organizaĵoj de proletaj liberpensuloj metas antaŭ si la taskon batalo kontraŭ la religio kaj kontraŭ ofensivo de l'klerikalismo. Ili estas kreitaj por ĉi tiu celo. Ja el ĉi tiu dualisma situacio por la social-demokratoj rezultiĝas tia dualisma politiko, kiun ili kondukas, kaj kiu fakte reduktiĝas al la sola — al rifuzo de batalo kontraŭ la klerikalismo, al efektivigo de la social-demokrata partilinio, sed nur per aliaj metodoj, ofte beligante ĝin per maldekstrumaj frazoj.

La situacio plikomplikiĝas pro tio, ke en nuna momento kune kun ĝenerala aktiviĝo de l'laborista movado okazas vasta foriro de laboristoj for de la social-demokratio, ligrompo de social-demokrataj iluzioj pro malkontento de laboristoj pri kontraŭproleta, burĝa politiko de ĉi tiuj partioj. Certan forpuŝan de social-demokratio rolon ludas ankaŭ eklezia politiko de partioj de la II Internacio, kreskas malkontento de laboristoj, en tiu nombro ankaŭ de laboristoj social-demokratoj, pri la konkordata politiko de partioj de la II Internacio.

En «Pravda» (de la 2 aprilo 1931) estis presitaj kelkaj leteroj de laboristoj, eksiĝintaj el la social-demokratia partio. Inter ili allogas atenton letero de la membro de la social-demokratia partio ekde 1898 j. laboristo Ludwig Holte.

Li skribas: «En 1898 jaro mi fariĝis ano de la germana social-demokratia partio. Mi penis pravigi la social-demokratian partion, konsiderante, ke en ĝia agado estis apartaj eraroj. Sed, kiam la social-demokratoj aprobis la asignon de kreditoj por konstruo de la kirasŝipo «A» kaj senhonte kontraktis konkordaton kun la plej furioza malamiko de l'proletaro — kun la katolika eklezio, mi jam ne povis trovi iujn pravigojn.

Tiaj faktoj ne estas solaj.

En ĉi tiuj disfalkondiĉoj de la social-demokratia partio, social-demokrataj liberpensul-organizaĵoj estas nun por la social-demokratio enkaptejo tiurilate, ke malkontentaj pro la konkordata politiko de siaj gvidantoj, social-demokratiaj laboristoj povas eniri tien, en ĉi tiujn organizaĵojn. Ekzisto de la social-demokratiaj organizaĵoj de liberpensuloj kreas por laboristoj la iluzion, kvazaŭ la social-demokratoj, ankaŭ batalas kontraŭ religio. En la social-demokrataj partioj dispartigo de laboro estas plena: la partio kontraktas konkordatojn kun eklezio, havas en sia konsisto pastrojn, kristanajn «socialistojn», aliancas kun klerikaluloj, kaj samtempe en ĝia konsisto estas homoj, kiuj fanfaronas pri sia liberpensuleco, pri sia radikalismo, kaj kiuj eĉ ĉefas ateistajn organizaĵojn. Fariĝas kvazaŭo de tio, ke la social-demokratiaj partioj kondukas ne nur la konkordatan politikon, sed ili ankaŭ ebligas batali kontraŭ religio al tiuj, kiuj, en ĝiaj vicoj malkontentas pro la proksimeco de eklezio. Sed fakte nur estas la kvazaŭo de la kontraŭreligia batalo. Sed la social-demokrataj organizaĵoj de liberpensuloj bonege plenumas sian rolon de la enkaptejo por maldekstrumema laboristaro, plene ankoraŭ ne rompinta ligon kun social-demokrataj iluzioj kaj ankoraŭ ne konsciinta, ke la partioj de la II Internacio povas kaj volas neniel batali kontraŭ ofensivo de la klerikalismo.

Ni pritraktu la fundamentajn demandojn, rilatantajn al la politiko de social-demokratio en la internacia liberpensula movado. Ĉi tiuj demandoj estas jenaj: 1) politiko kaj senpolitikeco, 2) rilato de la social-demokratio al la ofensivo de eklezio kaj al eklezipolitiko, 3) rilato al Soveta Unio kaj al la kontraŭreligia politiko de la soveta potenco kaj 4) rilato al burĝaj organizaĵoj de liberpensuloj.

Kiam en la jj. 1924—25 organiziĝis la Internacio de proletaj liberpensuloj, al ĝi aliĝis ankaŭ maldekstrumaj organizaĵoj. Kvankam jam dum unuaj kongresoj la social-demokratoj montris, ke ili havas fortan inklinon al unueco kun burĝa-radikalaj «liberpensuloj», tamen premataj de membro-amaso ili estis devigitaj akcepti la kvankam sagacan, sed revolucian programon. Ĉi tiu programo diris, ke la organizaĵo de proletaj liberpensuloj estas la socialista organizaĵo kaj ke ĝi ligas sian sorton kaj sian laboron kun la ĝenerala batalo de l'laborista klaso. § 1 da la statuto de IPL batezis: «IPL estas unuiĝo de la liberpensulaj organizaĵoj, bazantaj sin sur la revolucia marksismo kaj klasa batalo». En la kongresoj de l'Internacio, interalie en la Kölna kongreso (1928) estis akceptita la politika rezolucio, verkita sur bazo de ĝusta takso de la duma ŝanceligebla stabiliĝo de l'kapitalismo kaj sur bazo de el tio rezultantaj taskoj de IPL. Vere, la rezolucio estis akceptita spite kaj kontraŭ volo de socialdemokrataj gvidantoj, sed ĝi atestis ekziston de la forta maldekstra alo en ĉiuj sekcioj de IPL. Grandan influon de maldekstra flanko montris, ekzemple, elektoj por la gvid-organoj de Berlina organizaĵo en 1928 j., kiam malgraŭ teroro de organizaĵgvidantoj, malgraŭ eksigoj de plej bonaj laborantoj, la maldekstra alo ricevis 42429 balotvoĉojn, sed la social-demokratoj — 41865. Fortaj revoluciaj tendencoj dum tuta ekzisto de IPL elmontris sin en organizaĵoj, kaj social-demokratoj estis devigitaj ilin atenti. Ili tiam ne rifuzis ĵongli per maldekstrumaj frazoj por ŝirmi siajn dekstrumajn agojn. Ĉiuokaze ili estis devigitaj atenti la fundamentan principon de IPL, esprimitan en ties pro-

gramo: «La proleta movado de liberpensuloj estas branĉo de la granda socialista movado», atentition, ke ĉi tiu movado «servigas sin al la proleta liberigbatalo».

Sed kune kun ĉiam plia transiro en la tendaron de burĝaro la social-demokratio forĵetas ĉiun revolucian frazaron, kaj eĉ parola maldekstrumeco estas forĵetata, kiam necesas ĝisfine efektivigi la politikon de social-faŝisma detruo de la proleta ateista movado. En № 4 (1931) la gazeto de la germanaj proletaj liberpensuloj «Proletarische Freidenker Stimme» publikigas la leteron de Hartwig, eksprezidanto de IPL, eksigita en la kvara kongreso (la novembro, de 1930) el la Internacio, en kiu li skribis, ke en batalo kontraŭ revoluciaj organizaĵoj de proletaj liberpensuloj la social-demokratoj esperas helpon de la germana polico.

Efektivigante en organizaĵoj de liberpensuloj la politikon de sia partio, la social-demokrataj gvidantoj samtempe ĉie kriis, ke ili, la social-demokratoj, en la amasaj organizaĵoj de l'proletaro *ne okupas sin pri politiko*. Ili diris, ke ekzistas tri tipoj de organizaĵoj laboristklasaj: politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj. Ni, la liberpensuloj, estas organizaĵo kultura, kaj por ni neniom taŭgas politiko, asertis la social-demokratoj. Konsekvence ili deklaris, ke necesas peli komunistojn el liberpensulaj organizaĵoj, ĉar ili enkondukas politikajn momentojn en laboron de organizaĵoj kaj pro tio ili precipe ne rajtas esti iliaj membroj. Kaj tiu kurĉasado, kiun la social-faŝistoj aranĝis kontraŭ komunistoj, laŭ iliaj asertoj estis aranĝataj je nomo de l'senpolitikeco. Ke la social-demokratoj ĉiel laboris por malaltigo de politika nivelo de organizaĵoj, pri tio forestas dubo. Jen estas kelkaj ekzemploj. La gvidanto de la Germana Asocio de Liberpensuloj, social-demokrato Sievers dum la kunsido de IPL-ekzekutivo, en novembro de 1928 j. parolis pri la germana Asocio, kiel pri la asocio de «spiriteliberaj homoj», sed ne kiel pri la asocio de ateistoj. Plue li deklaris: «ni forigos el niaj ĝeneralkunvenoj ĉion, kio ne rilatas al la movado de liberpensuloj

(ekzemple sindikatajn kaj politikajn problemojn, demandon pri ligo de nacioj, ktp)». Sekvas, la social-demokratoj pri politiko «ne okupas sin». Do, pri kio devas okupi sin la organizaĵoj de proletaj liberpensuloj?

Jen kion diras Sievers:

«Dum lasta jaro oni rimarkas laciĝon de germana loĝantaro pro kunvenoj. Tial ni volas ion organizi por pliintensigi vizitadon de kunvenoj. Ni revas pri kino-filmoj kun spirite libera tendenco. Krom tio en niajn kunvenojn ni volas enkonduki pli multe da muziko kaj kantado».

Dum la epoko de akra klasbatalo, de pliampleksiĝo de l'laborista movado la social-demokratoj, gvidantaj amasajn organizaĵojn de liberpensuloj deklaras, ke la laboristoj laciĝis pro politiko, kaj ke oni devas okupi sin ne pri politiko, sed pri muziko kaj kantado. Plej bonan servon por la kapitalo oni ne povas elpensi: for la politikon, for la klasbatalon, vivu la kantado kaj muziko — jen estas devizoj de l'social-faŝistoj.

Laboristojn, unuigantajn en organizaĵoj de liberpensuloj, malkontentajn pro konkordata politiko de la social-demokratoj, sinjoroj Sievers'oj nutras per muziko kaj certe ne ebligas al ili kritiki la kontraŭlaboristan politikon de la social-demokratia partio. Per tio mem ĉiuj organizaĵoj, kiujn gvidas la social-demokratoj kaj plenumas rolon de la ventolilo, servas por forigo de malkontento pro perfidula politiko de la social-demokratio. Konsiderante gvidatajn de ili organizaĵojn «spirite-liberajn» kaj senpolitikaj, la gvidantoj de la Germana Asocio de Liberpensuloj aspiris ĉe la burĝa registaro rajton de la korporacioj t. e. tiujn rajtojn, kiujn ĝuas ekleziorganizaĵoj, alivorte, ili volas la revoluciajn proletajn organizaĵojn transformigi je siaspecan ekleziorganizaĵon [1]). Ĵetante la devizon «For la politikon», la

[1]) Ĉi tiu ekzemplo tre bone montras opinievoluon de la social-demokratoj. En novembro de la j. 1926 la plenkunsido de IPL-ekzekutivo en Prago kategorie kontraŭis ĉiujn provojn ricevi por la organizoj, enirantaj en IPL, ŝtatan agnoskon kaj ankaŭ

social-demokratoj samtempe gvidas la kampanion por eksigi komunistojn, por forigi ilin el la organizaĵo. Kulpigante komunistojn pro skismo kaj frakciemo, la social-demokratoj kreis en la organizaĵoj siajn social-demokratiajn frakciojn kaj laboris laŭ direkto de social-demokrataj partioj.

Hartwig, estinte prezidanto de IPL, dum la kongreso de proletaj liberpensuloj en Bodenbach (Ĉekoslovakio) en 1929 jaro deklaris: «La Internacio estos partie-politike neŭtrala aŭ tute ne ekzistos. Ni ne toleros, ke nia glora movado de liberpensuloj estu utiligata por parti-politikaj celoj». Tio estas dirita sufiĉe multsignife kaj samtempe fama Hartwig inspiris la frakcian politikon de l'social-demokratoj.

Montrante sin senpolitika, Hartwig kaj K-o faris belajn politikajn gestojn, kaj en la j. 1927 li elpaŝis kiel peranto inter Profinterno kaj Amsterdama Internacio de Sindikatoj. Dolorante pri tio, ke la laborista movado estas dispartigita, Hartwig per speciala memorandumo proponis kunigi ambaŭ Internaciojn de sindikatoj kaj «raciigi» la klasbatalon. Ĉi tiu gesto devis substreki «superpartiecon» de social-demokrato Hartwig.

Sed li maltrafis, ĉar dum Profinterno respondis, konsente pri perado de IPL por la afero de unuecigo de la monda sindikatmovado en unueca Internacio, la amsterdamanoj malakceptis la proponon. Kaj Hartwig kun K-o penis rapidritme la aferon neniigi, ĉar daŭrigi parolon pri ĝi signifus dismaskigi la amsterdamanojn, t. e. social-demokratojn. Alia afero estus, se Profinterno rifuzus la peradon de Hart-

---

kontraŭis ricevon de ĉiaj subvencioj de burĝaj registaroj. Post 4 jaroj la gvidantoj de la germana organizaĵo ekpostulis de la registaro rajton de la eklezikorporacioj. Estas memkompreneble, ke por subvenciricevo de la burĝa ŝtato necesas sufiĉe montri sian lojalecon kaj nerevoluciemon. Jen pro kio samtempe, kiam la social-demokratoj aspiris por si la korporacirajtojn, ili ankoraŭ komencis precipe kruelan kurĉasadon kontraŭ la komunistoj.

wig,—tiuokaze li trovas, kion paroli. Ĉiuj atestoj de l'social-demokratoj, ke en ateistaj organizaĵoj ili estas senpolitikaj ne estas kritikrezisteblaj kaj ne respondas al realaĵo. Ilia aspiro mem pri «senpolitikeco» jam estas la politiko, kaj eĉ la politiko, diktita al ili de la burĝaro. La «senpolitikeco» estas bezonata kiel vojo por delogi malkontenton de laboristoj pro burĝa politiko de l'social-demokratiaj partioj. Ja, se oni starigas problemon de batalo kontraŭ religio en sole ĝusta direkto politika, do oni devas neeviteble trafi la problemon pri politika rolo de religio kaj intereso de burĝaro fortikigi ĝin kaj pri lakeeca rolo de l social-demokratio, helpanta ofensivon de l'klerikalismo. Tian traktadon de la problemo la social-demokratio havas kaŭzojn por eviti.

Dua demando, kiu malkovras la insolventecon de la social-demokratio en ateista movado, estas la demando pri la ofensivo de l'klerikala reakcio en kapitalistaj landoj. Nuntempe ĉi tiu demando staras akre en la tuta mondo. En ĉiuj kapitalistaj landoj la eklezio, paŝo post paŝo, konkeras al si ĉiam novajn kaj novajn poziciojn. Ni prenu por ekzemplo Germanion. Ĉi tie la konkordato kun la katolika kaj evangelia eklezioj estis kontraktita kun helpo kaj eĉ per manoj de la social-demokratoj. Ĉi tie dank'al subteno de la social-demokratio, estas konservataj eĉ ĝis nun multaj punktoj en la leĝaro, kiuj punas pro blasfemo, aborto, (la lasta estas persekutata pro konsideroj de religia karaktero). Memevidente, ke la organizaĵoj de la proletaj liberpensuloj unuaj devis organizi batalon kontraŭ la ofensivo de eklezio, kontraŭ disponigo al ĝi precipajn privilegiojn kaj prerogativojn. Sed en Germanio tiutempe, kiam estis kontraktata la konkordato kun la katolika eklezio, la liberpensulan asocion ĉefis la social-demokratoj. Ili ne povis kaj ne volis elpaŝi kontraŭ la ofensivo de eklezio, interalie kontraŭ la konkordato, ĉar ili devus tiuokaze elpaŝi kontraŭ sia partio. (Ni jam diris, ke nome social-demokrato Braun, la ĉefo de l'prusia registaro subskribis la konkordaton

kun la katolika kaj pliposte ankaŭ kun la evangelia eklezio).

Kiam la konkordato estis en tagordo la ĉefo del'germana asocio de liberpensuloj Sievers en plenkunsido de IPL-ekzekutivo en Vieno en novembro de 1928 jaro deklaris: «En nuna momento al Prusio minacas la konkordato. Konekse kun tio mi kondukas malfacilan batalon, kiu por ni estas pli malfacila ankoraŭ pro tio, ke la socialistoj, eble voĉdonos por la konkordato. Definitive tio ankoraŭ ne estas konata, sed kompreneble mi komencis batalon jam nun, kaj ni batalos kontraŭ ĉiu partio, kiu elpaŝos por la konkordato. En ĉi tiu batalo nin helpos ĉiuj social-demokratoj, organizitaj kiel liberpensuloj...».

Du monatoj antaŭ la konkordatkontrakto Sievers diris antaŭ la plenkunsido de IPL-ekzekutivo, ke la social-demokratoj «eble» voĉdonos por la konkordato, sed, ke la liberpensuloj batalos kontraŭ ĉiu partio, kiu intencas kontrakti la konkordaton, kaj ke ilin subtenos ĉiuj social-demokrataj liberpensuloj. La konkordato estis kontraktita en februaro de 1929 j. Ĝin subskribis la social-demokrato Braŭn, ĝin voĉdonis ankaŭ liberpensuloj — membroj de la rejĥstago kaj la asocio de liberpensuloj sub gvido de Sievers mem nenion faris por organizi la kampanion kontraŭ la konkordato. Eĉ pli, ĝi ne eksigis el sial vicoj tiujn membrojn de la rejĥstago (ŝtatparlamento), kiuj voĉdonis por la konkordato. Anstataŭ batalo kontraŭ la konkordato estis komencita kalumniado kontraŭ la kompartio — la sola partio, batalanta kontraŭ subigo de Germanio al pastraro. Sinjoro Sievers klarigis la rifuzon de batalo kontraŭ la konkordato per tio, ke laboristoj ne interesiĝas pri tiu afero.

Alia problemo, kie social-demokratoj, ĉefantaj la asocion de liberpensuloj, senmaskigis sin kiel subtenantojn de l'reakcio, estas la lerneja problemo. En Germanio lastaj jaroj pasis sub la devizo de batalo pro lernejo. La pastraro precipe furioze atakis, aspiranke ricevi en siajn manojn kontrolon pri popollernejo. Por organizi kontratakon es-

tis kreita la ligo de batalo kontraŭ kultura reakcio, al kiu enkomence aliĝis ankaŭ la asocio de liberpensuloj. Tamen la lasta dum kulmina momento de la batalo eksiĝis el la ligo kaj malpermesis al siaj membroj esti liganoj. (Tio okazis en fino de 1927 jaro). Kial tio okazis? La social-demokratoj komprenis, ke la batalo kontraŭ la lerneja leĝo povas konduki ilin en tro malagrablan por ili kampon — ja la social-demokrata partio de Germanio helpadis al realigo de tiuj kaj aliaj reakciaj leĝoj. Ili timis ankaŭ, ke la movado neeviteble estos gvidata de la komunistoj, de sola partio, kapabla por batali ĝis fino kontraŭ la ofensivo de l'klerikalismo, jen kial ili eksiĝis el la ligo de batalo kontraŭ la lerneja leĝo.

Similmaniere ili agis en ĉiuj aliaj demandoj, kiam temis pri batalo kontraŭ la klerikalisma ofensivo. Ŝajnigante, ke ili partoprenas ĉi tiun batalon, la social-demokratoj fakte sabotis la batalon kaj per tio plifaciligis al pastraro plenumi ĝiajn taskojn. Tio rilatas ne nur al Germanio, sed ankaŭ al aliaj landoj: nenie gvidataj de la social-demokratoj organizaĵoj de liberpensuloj kondukas kaj kondukis batalon kontraŭ la ofensivo de eklezio. La social-demokratoj ne povas gvidantigi sin por ĉi tiu batalo, ĉar ili mem estas efektivigantoj de la klerikala reakcio.

En sia sinteno al USSR kaj al la politiko de la soveta registaro en sfero de kulto, la social-demokratoj praktike realigas la politikon de la II Internacio, kiu, kiel estas konate, elpaŝas nepacigeble kontraŭ USSR. Tian saman kalumniadon kontraŭ Soveta Unio, kiun la social-demokratio ordinare utiligas por batalo kontraŭ Sovet-Unio, funkciigas por batalo kontraŭ USSR ankaŭ la social-demokratoj, gvidantaj liberpensulajn organizaĵojn. La batalo kontraŭ USSR por ili estas pro tio pli grava, ke la sukcesoj de la socialisma konstruado, kaj sur ĉi tiu fundamento kresko de la ateismo en la lando de l'Sovetoj, fortikigas en la internacia liberpensula movado pozicion de la maldekstra alo, plifortigas influon de komunistoj kaj malfortigas la

tiun de la social-demokratoj. Rilate al USSR la gvidantoj social-demokratoj plenumas en la organizaĵoj de liberpensuloj plej malnoblan rolon, ili prenas je si mision detrui inter simpatiantaj al USSR laboristoj ilian simpation al Sovetlando. Tiujn laboristajn amasojn, kiuj estas malkontentaj pro la konkordata politiko de la social-demokratio, la gvidantoj de liberpensulaj asocioj penas per kalumniado kaj malĝusta informado indignigi kontraŭ la lando de l'Sovetoj.

Ni observu tion per kelkaj ekzemploj. Kiam la gvidantoj de la germana social-demokratio kontraktis la konkordaton kun la katolika eklezio en Prusio, kiam ili ĉiurimede akceladis la ofensivon de klerikala kontraŭrevolucio, ĝuste tiam por delogi malkontenton de laboristaro for de la politiko la social-demokratoj ekfunkciigis fabelojn pri konkordato en USSR, kiun kvazaŭ faris la bolŝevikoj kun eklezio. Ĉi tiun kalumnian kampanion eksubtenis ankaŭ la social-demokratoj — gvidantoj de liberpensulaj organizaĵoj. Ekzemple, en mezo de la j. 1927 pro deklaroj de la ortodoksaj ekleziuloj (Mitropolito Sergio kaj aliaj) pri sia lojaleco al la Soveta potenco Sievers, la gvidanto de Germana Asocio de Liberpensuloj turnis sin kun ultimata letero al Centra Konsilantaro de Unio de Militantaj Ateistoj en USSR, postulante klarigojn pri la demando kaj minacante, se la respondo ne estos ricevita, elpaŝi per gazetaro kontraŭ USSR. La sama Sievers en januaro de la jaro 1928 en la kongreso de Internacio liberpensula en Köln postulis, ke Unio de Ateistoj en USSR batalu kontraŭ la Soveta registaro pro tio, ke ĝi permesas konstrui preĝejojn. La homoj, tute nenion farintaj por batalo kontraŭ la vera ofensivo de l'klerikalismo, por batalo kontraŭ la social-demokratio, kiu per manoj de siaj gvidantoj faras konkordatojn kun pastraro, ĉi tiuj homoj «postulis» en la internacia kongreso de liberpensularo batalon kontraŭ la Soveta registaro pro ĝia «interpaciĝemo» kun eklezio. Memkompreneble, ĉi tiu iinio estis diktita de la ĝenerala politiko de l' II-a Internacio rilate al USSR, postulanta kreon de l'malamikaj al Sovet-

lando humoroj en laborista klaso. Por ĉi tiu celo la «liberpensantaj» social-demokratoj ankaŭ ne haltiĝas antaŭ utiligo de religio.

Simile al siaj germanaj kamaradoj kondutas ankaŭ la aŭstriaj social-demokratoj — gvidantoj de l'asocio de liberpensuloj. Kiam en decembro de 1927 j. en burĝa gazetaro aperis la falsa «intervjuo» de kamarado Stalin pri kvazaŭ kontraktita konkordato inter soveta registaro kaj «sankta ortodoksa eklezio», la falsaĵon antaŭ ĉio ekutiligis la Viena gazeto «Arbeiter Zeitung» — organo de l'aŭstria social-demokratia partio, provinta utiligi la falsaĵon por pravigi la religian politikon de partioj de la II Internacio. Post burĝa gazetaro la fabelon pri unio inter la soveta registaro kaj eklezio ekfunkciigis ankaŭ gvidantoj de la aŭstria asocio de liberpensuloj. En ilia gazeto «Der Freidenker» N1 de 1928 j. en revuo de okazintaĵoj de 1927 j., estis presite: «Kiom malmulte valoras la radikalismo de komunistoj, atestas la intervjuo de la ĝenerala sekretario de VKP(b) (Tutsovetia Komunista Partio) Stalin en la gazeto «Neŭe Freie Presse» de 10 decembro 1927, en kiu li nomas la ateistojn «politikaj malsaĝuloj» kaj «krimuloj kontraŭ la afero de Sovetoj» kaj agnoskas, plej grandan meriton de nova politikdirekto — la interkonsenton kun «sankta ortodoksa eklezio». En Rusio komunistoj serĉas interpaciĝon kun eklezio, sed en Aŭstrio ili suspektas funkciulojn de liberpensula asocio pri perfido kaj riproĉas ilin, ke ili ne energie batalas kontraŭ la klerikalismo. Sed similaj infanecaj elpensaĵoj ne povas miskomprenigi veran liberpensulon. Li scias, ke la vojo, sur kiu ni iras, estas bona...» Tiel skribis la social-demokratia liberpensula gazeto. Jam la klarigkaraktero mem de falsa intervjuo de Stalin montras, ke ni ĉi tie havas provon per mencio de la «interkonsento» kun eklezio en USSR pravigi social-demokratian rifuzon de batalo kontraŭ la klerikalismo.

Ankaŭ ĉi okaze kalumniante kontraŭ USSR la social-demokratoj liberpensuloj restis fidelaj al sia partio kaj laŭ-

vorte ripetis tion, kion ĝi diktis al ili. Sufiĉas nur kompari, kion skribis pri ĉi tiu demando la Viena social-demokrata gazeto «Arbeiter Zeitung» (en numero 11, decembro 1927 j.) por konvinkiĝi pri tio. Jen kiamaniere la social-demokratia gazeto komentis la «intervjuon de Stalin»:

«... Malfacile nur estas kompreni laŭ kiu rajto la eŭropaj komunistaj partioj kulpigas la social-demokration pro perfido, se ili mem aspiras la saman religi-politikan celon, kiun Stalin konsideras plej granda sukceso de la rusa revolucio» (pli supre la gazeto sciigis, ke kamarado Stalin kvazaŭ konsideras pleja sukceso de l'rusa revolucio tion, ke «sankta ortodoksa eklezio laboras mano ĉe mano kun soveta registaro)... Ni vidas, ke la «traktado» de la «intervjuo de Stalin» la social-demokratoj de «Freidenker» plene transskribis el «Arbeiter Zeitung». Do, se sub gvido de la social-demokratoj, organizaĵoj de liberpensuloj transformiĝas je rifuĝejo, kien estas delogata kolero de malkontentaj pro konkordata politiko de social-demokratio laboristoj, ankoraŭ ne venintaj al la komunismo, samtempe sub ilia gvido ĉi tiuj ogranizaĵoj transformiĝas je ruza batalilo de social-demokratio kontraŭ USSR, je ilo, por detrui simpatiojn de laborularo kapitalistlanda al Sovetunio. Multajn ekzemplojn oni povus citi. Kiam en la j. 1926 USSR'on vizitis la delegacio de proletaj liberpensuloj el Germanio, tiam unu el ĝiaj membroj social-demokrato Meder, reveninte Germanion verkis kalumnian kontraŭsovetian broŝuron «Inter Baku kaj Moskvo» En la j. 1927 antaŭ la 10 datreveno de la Oktobra revolucio la gvidantoj de germania kaj aŭstria asocioj de liberpensuloj (social-demokratoj) rifuzis sendi delegaciojn de siaj organizaĵoj al USSR por festo de la dekjara datreveno de la Oktobro, demonstrante per tio sian malamikecan pozicion rilate al Sovetlando.

Sed precipe okulvideble ĉi tiu transformiĝo de liberpensulaj organizaĵoj, gvidataj de l'social-demokratoj je ilo de II Internacio kontraŭ soveta kurĉasado evidentiĝis

dum tagoj de l' «kruemilitiro» de la roma papo. Dum laboristoj organizis protestkampaniojn kontraŭ la krucportantoj kaj po mil eksiĝis el ekleziaj unuiĝoj, la social-demokratoj—ĉefoj de liberpensulaj asocioj per siaj agoj honte aliĝis al la papa kampanio. Anstataŭ mobilizi amasojn por batalo kontraŭ la «krucmilitiro», por batalo kontraŭ la klerikala reakcio, ili okupis pozicion, plifaciligantan al la ekleziuloj ilian laboron, ili aktive laboris por malmobilizi socian opinion de proletaro por malordigi la kampanion de USSR-defendo. En Aŭstrio, ekzemple, la social-demokrata asociadministrantaro eksigis tiujn aktivulojn kaj tiujn lokajn grupojn, kiuj organizis protestkampanion kontraŭ la «krucmilitiro» de l'papo roma. Hartwig, la prezidanto de Liberpensula Internacio en sia cirkulero de 4 marto 1930 j. pri «krucmilitiro» konsilis al liberpensulaj organizaĵoj «disvolvi nian agadon post ĉi tiuj okazintaĵoj»... t. e. post la «krucmilitiro», laŭesence tio estis alvoko por nemalhelpi al la papo okazigi lian kontraŭsovetian kampanion. Ankoraŭ pli malnoblan pozicion okupis la social-demokrata gvidantaro de Germana Asocio de liberpensuloj. En plej akra momento de la papa kampanio en la gazeto de l'Germana asocio «Der Freidenker» estis presita la artikolo de trockianino Petrova, en kiu ŝi plene solidariĝis kun la kontraŭsovetia kampanio de ekleziuloj, aldonante nur tion, ke «ne la papo, la ĉefo de organizaĵo por ekspluatado kaj malkonsciigado de popolo, rajtos indigni kontraŭ la teroro de Soveta registaro, sed ni, liberpensuloj...» [1]).

---

[1]) Ĉi tie denove estas laŭvorta ripeto de tio, kion skribis social-faŝista gazetaro.

Berlina «Forwärts» (14/III—30) skribis, ke «iniciativo de la protestmovado kontraŭ la nova mezepoko en oriento apartenas pli vere al la internacia socialismo, ol al la katolikismo...»

Viena Gazeto de l'social-demokratoj «Arbeiter Zeitung» (16/II—30) skribis, ke «ne la papo, sed ni, social-demokratoj, devas defendi liberecon de l'konscienco, batalante kontraŭ la nova kurso de l'soveta politiko...»

Simile al tio, kiel la tuta social-faŝista gazetaro postulis por si iniciativrajton en la kontraŭsovetia kampanio, simile al tio, ankaŭ la social-faŝistoj, gvidantaj liberpensulajn organizaĵojn postulis por si la saman prerogativon.

Klarigante al sia organizaĵo, kiel la gvidantoj de Germana liberpensulasocio okupis similan kontraŭsovetian pozicion, Sievers en la letero al la organizaĵo en junio de la j. 1930 skribis: «Ni ne tiom tragedie konsideras la deklaritan de la papo batalon kontraŭ Soveta Rusio, kaj la tuta alarmado kiu estis poste instigita, estas nenio alia krom ordinara komunista teatreca reklamo...» Kiam ankaŭ en junio de 1930 — dum la plenkunsido de IPL-ekzekutivo en Vieno la UMA'a reprezentanto de USSR postulis aldonraporton pri la «krucmilitiro», tiam la social-demokratoj malakceptis la proponon. Sievers deklaris, ke li ne povas konsenti kun tio, ke Rusio okupu iun precipan lokon en la ekzekutivo. Certe sinjoroj social-demokratoj havis ĉiujn kaŭzojn ne deziri tiun aldonraporton, ĉar tiuokaze neeviteble evidentiĝus la perfida rolo de la social-demokratio entute kaj ties rolo de agento de l'II Internacio en la asocioj de liberpensuloj.

Fine, estas interesege observi la sintenevoluon de la social-demokratoj el prolet-liberpensulaj organizaĵoj al la burĝaj organizaĵoj de liberpensuloj. Ankoraŭ ne tiom antaŭlonge, dum kreo de l'Internacio de prolet-liberpensuloj estis iniciatita demando pri sinteno al ekzistantaj en Okcidento organizaĵoj de burĝaj liberpensuloj, unuigitaj ĉirkaŭ la Brusela Internacio. La lastaj estas inteligentulaj grupoj, plejbonokaze unuigantaj maldekstre-radikalajn elementojn,

---

Menŝevika «Socialista Heroldo» la 15 de marto 1930 j. skribis, ke ĝuste «ni, social-demokratoj, alvokas ĉiujn revoluciajn kaj socialistajn elementojn de Rusio kaj Eŭropo, ĉion honestan kaj progreseman por stampi, batalon kontraŭ religio kun helpo de ateistoj kaj Solovki...». La gazeto de liberpensulo Sievers kiel ni vidas, nur ripetis tion, kion skribis la tuta social-demokratia gazetaro.

por kiuj la batalo kontraŭ religio estas batalo kontraŭ erarkoncepto de la homa menso. Ĉi tiuj homoj nenion deziras scii ĉu pri la klasa batalo, ĉu pri la socialismo.

En fino de 1924 j., kiam estis kreata la Internac'o de proletliberpensuloj, en la Viena kongreso estis substrekita la diferenco inter la proleta kaj burĝa liberpenseco. La Brusel'a internacio malagnoskis la principojn de IPL, ĝian socialisman platformon, devizojn de la klasbatalo. Tial ĉiuj projektoj pri la kuniĝo estis malakceptitaj. En decembro de 1925 j. en la Leipziga kongreso de IPL denove estis pridiskutita demando pri la sinteno al la burĝa liberpensulmovado. La kongreso decidis, ke kunlabori kun aliaj organizaĵoj «estas eble nur tiuokaze, se la organizaĵoj agnoskas proletan pozicion». Ĉar la Brusel'a internacio tiun pozicion ne agnoskas, do pri la kunigo povas esti neniu parolo.

En 1925 j. Hartwig, la prezidanto de IPL en la gazeto de Ĉeha asocio de proletliberpensuloj (№ 18) skribis, ke «la epoko de l'burĝa liberpenseco pasis», ke «tagoj, de l'burĝa liberpenso jam estas kalkulitaj». Tamen, spite tiaj maldekstrecaj frazoj, la social-demokratoj en prolet-liberpensula movado ĉiam rigardis siajn amikojn el la burĝa tendaro, ĉiame gravitis al ili. Dum la akriĝo de la klasbatalo ĉiam pli ĵetis la social-demokratojn en burĝtendaron, samtempe kreskis ankaŭ la tendencoj al kuniĝo kun la burĝa liberpensulmovado. Laŭesence nenio interbaras la social-demokratojn kaj burĝojn el la Brusel'a internacio. Misiiginte al si forigon de l'politiko el IPL eleirfuminte transformigo de siaj organizaĵoj en specifikajn ekleziorganizaĵojn, subtenante la burĝan politikon de la II Internacio, kalumniante kaj kurĉasante komunistojn kaj USSR, la sinjoroj social-demokratoj elmontris, ke ili havas neniujn principajn malkonsentojn kun la bruselanoj. Jen pro kio la konferenco de proletliberpensula asocio en Germanio en aprilo de 1930 j. rezoluciis forĵeti la vorton «proleta» el titolo de la Asocio, kaj samtempe la administrantaro komencis inter-

traktadon kun la bruselanoj pri kuniĝo. Sievers en la konferenco deklaris: «Ĉe sojlo de IPL staris konflikto interne de la asocioj, la konflikto kun la tiel nomata Brusela internacio de liberpensuloj. La konflikto kun la brusela internacio devas esti likvidita. Ĝuste nia organizaĵo konsentinte kun IPL devas dum proksimaj 14 tagoj komenci intertraktadon kun francaj kaj belgaj kamaradoj, celante kunigi ambaŭ Internaciojn»... Tiamaniere la vojoj denove kuniĝis, post ĉiuspecaj deklaroj pri «estingiĝo de la burĝa liberpenso» la gvidantoj de l'social-demokrataj organizaĵoj venis al la burĝaro. Tio estas ankoraŭfoja pruvo de malkapablo de la II Internacio gvidi amasan proletan movadon, ankaŭ la ateistan. Interkonsento kun Brusel estis kontraktata ĝuste tiam, kiam el IPL la sinjoroj social-demokratoj forpelis ĝian revolucian alon, eksiginte la jenajn sekciojn dum la unua duonjaro de 1930 j.: francian, svisian, ĉeĥoslovakian kaj 100 milojn da revoluciaj liberpensuloj en Germanio, samtempe kurĉasante kontraŭ Unio de Militantaj Ateistoj de USSR. La burĝaj liberpensuloj havas ĉiujn kaŭzojn por ĝoji: la erarvaginta social-faŝista fileto revenis en patran burĝan marĉon. Kaj la organo de ĉeĥaj burĝaj liberpensuloj «Volna myšlenka» en numero de 28. XI—1930 jaro triumfe sciigis pri la okazinta interkonsento kun social-demokratoj, pri la kuniĝo. La gazeto skribis, ke post eksigo de la social-faŝistoj el IPL en ĝia IV kongreso en Teĉen (novembro de 1930) «ne ekzistas por la germanoj (t. e. social-demokratoj.—M. Ŝ.) bazoj, por ke ili revenu en la asocion, al kiu ili iam apartenis»...

Ĉi tiu kuniĝo jam estas nun la fakto. La 1 de septembro 1931 okazis tiu hontinda unuiga kongreso, en kiu Sievers'a Internacio oficiale unuiĝis kun la burĝa brusel'a. La prezidanto de ĉi «nova» liberpensulinternacio restis tiu de la burĝa—Terwagne, kaj kiel sekretario estis elektita prof. Hartwig, famekonata eksprezidanto de IPL. La cirklo kuniĝis.

Ni observis la politikon de la social-demokratoj, gvidintajn organizaĵojn de liberpensuloj, per kvar fundamen-

taj demandoj: 1) pri la politiko kaj senpolitikeco 2) pri la rilato al la ofensivo de l'klerikalismo, 3) pri la rilato al USSR, 4) pri la rilato al la burĝaj liberpensuloj.

Estas facile vidi, ke la linio ĉi tie estis nur sola — direkto al disvolviĝo de l'proleta ateismo en la burĝa, al likvido de la sendependa proleta ateista movado. En tio estas unu el la plej krimaj flankoj de menŝevika agado, farinta la organizaĵojn de proletliberpensuloj kiel aldonaĵon al la social-faŝistaj partioj, kiel kaptilon por malkontentaj laboristoj kaj por klopodantaj pri tio, ke ne kolektiĝu en ĉi tiuj organizaĵoj revolucia vaporo. Celante tion, nun ili definitive transiris en la tendaron de l'burĝa liberpensulmovado, forvivinta sin plene en nia tempo de akriĝintaj klasaj kontradicioj kaj klasbatalo. Ne estas mirinde, ke en la organizaĵoj kreskas malkontento, kaj ke vicaj membroj amase foriras al la komunistoj, foriras sub standardojn de l'vere proleta organizaĵo de liberpensuloj. Ne estas mirinde, ke la social-faŝistoj kaŝadis siajn intertraktojn kun la burĝa internacio, timante proteston interne de siaj organizaĵoj. Ju pli la social-faŝistoj enprofundiĝas en la burĝan marĉon, des pli rapide ankoraŭ plimultaj tavoloj de la laborularo rompas ligon kun ili.

Fine estas multinterese observi la rolon de l'dekstraj kaj «maldekstraj» social-demokratoj en la proleta ateista movado. Ankaŭ en ĉi tiu movado simile al tio, kiel tio okazas en la tuta social-demokratio, la «maldekstruloj» nebuligas kaj ŝirmas agojn de la dekstruloj kaj per siaj maldekstrecaj frazoj plifaciligas al la social-demokrataj organizaĵoj de la liberpensuloj plenumi rolon de spirejo por la malkontento pro la social-faŝista politiko. La aŭstriaj social-demokratoj en IPL ludis rolon de la «maldekstruloj» tiutempe, kiam la germanaj, gvidataj de Sievers tute senkaŝe kaj senhezite efektivigis la likvidpolitikon de proletaj ateistorganizaĵoj. Hartwig, kiam li estis la prezidanto de IPL, en sia broŝuro «Jesuo aŭ Karl Marks» skribis: «Vojo al la socialismo kuŝas trans ruinoj de eklezio».

Laŭaspekte tio estas kvazaŭ revolucia, «maldekstreca», laŭesence — malvera, ĉar vojo al la socialismo kuŝas trans ruinoj de l'kapitalismo, sed ne de eklezio. «Kiu apartenas al eklezio, — se li eĉ nur estas enregistrita en listoj de la apartenantoj al ajna certa konfesio — tiun oni devas konsideri kiel perfidulon de la socialismo» — skribas Hartwig en la sama broŝuro. Ankaŭ tio ne estas vera, ĉar ĉiujn kredantajn laboristojn konsideri apartenantajn al la tendaro de malamikoj de l'socialismo oni ne povas. Ĉi tiun penson Hartwig ripetas ofte: «Por rompi klasan regadon, necesas rompi potencon de eklezio», — skribas li en alia broŝuro («Dio kaj dia finjuĝo»). Laŭparole li estas tre revoluciema, sed laŭage li ĉiam ŝirmkaŝis la dekstrulojn.

Plej bonan figuron por la prezidantposteno la social-demokratoj ne bezonis: la maldekstrecan frazon li posedas perfekte. Tio necesas por pacigo, por amaso, sed la dekstrecan politikon de l'social-demokratoj li ankaŭ perfekte efektivigis kaj gvidis. Kiam senkaŝe estis prenita senhezita direkto al kuniĝo kun la burĝaj organizaĵoj de liberpensuloj, la «maldekstra» Hartwig jam ne estis bezonata. Jen pro kio dum la kongreso en Bodenbaĥ en 1930 jaro, post eksigo de l'social-demokrataj gvidantoj el IPL, ili kunveninte en sia kongreso elektis jam ne Hartwig'on, sed Sievers'on kiel prezidanton de IPL. Li ludas nune rolon de soldataĉo, kiu estas destinita fari perfidon ĝisfine por kontrakti blokon kun la burĝaro, jam ne estas bezonataj «maldekstruloj». Kaj tiun rolon li bone plenumis.

Kia estas konkludo el ĉio dirita? La konkludo estas tiu, ke la ateismo kaj la nuntempa social-demokratio — ne estas kunigeblaj.

---

# EKRELO

## Esperanta kontraŭreligia literaturo

en mkg.

*O. LEVADA*—SENDIULOJ STURMAS DNEPRON 0,20

*KANDIDOV*—EKLEZIO KAJ OKTOBRA REVO-
LUCIO 0,20

ANTAŬEN AL BATALO KAJ VENKO 0,10

*M. ŜEJNMAN*—MORALO RELIGIA KAJ MORA-
LO PROLETA 0,20

---

**Mendu ĉe administrejo de**
**Ekrelo, Leipzig N 24, Löbauerstr. 35**

„EKRELO“
Löbauerstr. 35
LEIPZIG N 24
Germanio

BUCHBINDEREI
VRBA